



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu numero : 6 FF. Abono por 1987 kun adresaro : 30 FF
 Ĝiri al la poŝtkonta numero : 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:
 Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

ENHAVO

- * Hazono estas granda en Esperantujo! (M.Turin) ...2
- * Nia debato : MONDSOCIALISMO (Soc. Partio de GB,
 Jakelino, Garolo, Ĵanseb, Jopo, J.G.) ...3
- * Vortoj de Maljunulo (Valo) ...13
- * Julnokto en Vieno (Petro Jayer) ...16
- * Estas tiel (Pako la Tria) ...17
- * Pri vira fanfaronemo kaj literaturo (I.N.) ...18
- * Ĉies Voĉo (Valo, Ĵanseb, Lorent, DIK) ...19
- * Al vere suferanto kiel leprulo (Lina Trenner) ...25
- * Por niaj infanoj : Sinjorino Holle (Hagen Hirte) ...26
- * Laŭtaj petoj kaj informoj (F.E.N., Mondhejmo,
 APJR, k.a...) ...29
- * Intervjuo kun Itacir Luchtemberg (P. Dubourg) ...32
- * SAT-Broŝurservo ; la gramatiko de Lanti (Valo) ...34
- * Krucvortenigmo (Sfinksido) ...35
- * Bilanco de L! kaj de SAT-BS por 1986 ...36
- * Aldono : Informoj por la franca laŭtularo

1887 ESPERANTO 100-JARA 1987

HAZARDO ESTAS GRANDA EN ESPERANTUJO !

Dum Pentekosto 1986 en Gérardmer, kie okazis la kongreso de U.F.E., S-ino Cheverry parolis pri S-ro Péraire, kiu antaŭ la milito, biciklis al Ĉinio (la vojaĝo daŭris 4 jarojn!) : " - li estas tre maljuna, sed ŝatus scii ĉu en Ĉinio iu memoras ankoraŭ pri li."

Ĉar mi intencis ĉeesti la U.K. en Pekino mi notis tiun informon. Tamen mi opiniis, ke serĉi iun (inter la miliardo da Ĉinoj!), kiu konis S-ron Péraire, estis kvazaŭ frenezaĵo! Sed mi jam tiom ofte spertis la feliĉigajn hazardojn en Esperantujo, ke mi iom esperis.

Dum la Kongreso estis ege malfacile kontakti kongresanojn, ĉar ĉiuj multe ekskursis, la Ĉinoj estis ege okupataj pri la Kongreso, la rendevua tabulo ne bone funkciis ; fakte mi ne plu pensis pri la afero.

Antaŭ ol reflugi al Eŭropo, miaj geamikoj kaj mi devis pasigi tagon en Pekino sen programo. Sed ĉina amiko organizis por ni kunvenon de veteranoj, kiuj ne povis ĉeesti la kongreson kaj deziris renkonti gesamideanojn el Eksterlando. La kunveno tre bone sukcesis kaj poste miaj geamikoj francaj tagmanĝis en ĉina familio kaj mi en alia kun ĉina amikino.

Mia gastiganto estis tre maljuna kaj pene parolis en Esperanto, sed dank'al la junulino la konversacio estis interesa dum la tuta tagmanĝo. Subite la maljunulo klarigis, ke li lernis esperanton el Franco, kiu venis al Ĉinio, sed bedaŭrinde li perdis, dum la milito en Ĉinio, ĉiujn dokumentojn kaj memoraĵojn de tiu epoko. Do, de kelkaj horoj mi estis kun la persono, kiun mi deziris renkonti! Vere mia ĝojo estis grandega. Kaj mi promesis rilatigi la du amikojn.

Reveninte hejmen, mi serĉis la adreson de S-ro Péraire. Mi telefonis al Grezijono kaj S-ro Babin respondis al mi : "Sendube nur mi konas la novan adreson de tiu maljuna samideano, kiu ĵus translokiĝis en maljunuldomo!". Jen : S-ro Lucien Péraire, Foyer Emeraude, Ch.7, F 22380 Saint Cast le Guildo.

Kiam mi skribis al li, li estis feliĉa, sed ankoraŭ pli feliĉa estis la Ĉino, kiam li ricevis rektajn novaĵojn el la malnova amiko.

Por mi estis pozitiva sukceso de la Kongreso en Pekino !

Pontarlier dum decembro 1986a

Marcelle Turin

Ndlr. Jen ege ĝojiga informo por la legantaro de **Laŭte!**, kies abonanto estis de la komenco nia amiko L. Péraire! La novaj gelaŭtuloj eksciis, ke SAT-Broŝur-servo projektas reeldoni, tuj kiam eblos, la broŝuron "Tra la mondo per biciklo" plus la felietonaĵojn iam aperintajn en L!. Amikan saluton de ni ĉiuj al Alfa-Beta!

MOND SOCIALISMO

"... La liberala kapitalismo kvazaŭ kolapsas ; tio estas fakto, sed la socio ne povas tamen trovi resaniĝon en burokrata ŝtatsocialismo, aŭ ŝtatkapitalismo. Oni devas trovi socisistemon, kiu ebligis individuan iniciativon, ĝuadon de la planedaj riĉaĵoj kaj kiu tamen malebligis la ekspluatadon de homo super alia homo..." LANTI

(Leteroj, p.107 de la reeldono)

La ĉi-postan enkondukon proponas malgranda partio, kiu havas fratorganizaĵojn en kelkaj landoj (Aŭstralio, Aŭstrio, Kanado, Irlando, Novzelando, Usono...) kaj antaŭ pluraj jaroj eldonigis sian Manifeston en esperanto. Ĝia adreso : Socialisme Mondial, B.P.26, B-6700 Arlon.

Ni, la Socialista Partio de Grandbritio, volas prezenti al Vi, por stimuli diskutadon, mallongan resumon de nia politiko. Estas en aliaj landoj samopiniaj partioj kaj grupoj.

En ĉiuj mondopartoj, etaj minoritatoj superregas je sia profito, aŭ rekte aŭ per la ŝtato, la vivrimedojn de Homaro. Kvankam nun ekzistas la produktofortoj, krudmaterialoj, homaj energioj kaj scioj, kiuj necesas por provizi plenan liberan vivon por ĉiuj homoj, oni ne povas tiucele dediĉi ilin en la nuna socisistemo komerca. Ĉi tiu ege misuzema sociordo estas kapitalismo. La alternativa sociordo, nia celo, kiun ni nomas "Socialismo" aŭ "Komunismo", ankoraŭ ne ekzistas ie ajn.

Socialismo baziĝos je komuna posedo de kaj demokrata rego super la vivrimedoj fare de la tuta komunumo kaj en ties intereso. Jen tutplaneda komunumo sen naciaj landlimoj, en kiu oni produktas varojn kaj servojn per nedevisa kunlaboro, sole kaj rekte por uzado. Profitfarado ne plu estos la sociopelilo ; aĉetado kaj vendado - do ankaŭ prezoj, salajroj, profitoj, mono, bankoj ktp. - ne ekzistos. Ĉiu rajtos libere preni aĵojn laŭ bezono. Sociaj aferoj estos administrataj en tute demokrataj procedoj. Ekzistos nek deviga ŝtatmaŝino, nek armitaj fortoj.

Evidente minoritato ne povos trudi la kunagadan entuziasmon kaj socian respondecon, kiujn necesigos Socialismo ; do nur konscia majoritata agado povos establi la novan socion. En modernaj politikaj kondiĉoj, socialista majoritato povas enpotenciĝi per balotado, kaj la sola obstaklo al establo de Socialismo estas la neesto de tia majoritato. Tial la plej grava

tasko de socialistoj estas disvastigo de socialistaj ideoj kaj plimultigo de homoj, kiuj komprenas kaj deziras socialistan socion.

Gvidanteco estas kontraŭsocialista principo. Socialista organizaĵo, celanta demokratian socion, devas mem esti tute demokrata. Ni oponas la koncepton leninistan de "avangarda partio". Fakte Bolŝevismo estas dudekjara teorio por burĝaj revolucioj en kamparanaj landoj.

Registara posedo de moderna industrio estas ŝtatkapitalismo. Oni administras naciigitajn industriojn per kapitalistaj metodoj por profite vendi varojn sur mondaj merkatoj. Orienta Eŭropo, Sovetunio, Ĉinio, Kubo ktp. ne estas kaj neniam estis socialistaj socioj. En ĉi tiuj landoj evidentas la ĉefaj trajtoj de kapitalismo : la perŝtata rego de privilegiita klaso, kiu superregas la vivrimedojn, pormerkata produktado, la salajra sistemo, kapitalakumulado.

Ni, mondsocialistoj, oponas ĉiujn formojn de rasismo kaj naciismo. La salajrlaboristoj ne havas patrujon. Kiam ajn ili subtenas siajn estrojn en iu internacia konflikto, ili oponas sian propran intereson. Ni oponas ambaŭ flankojn de ĉiuj militoj ; militoj kreskas el la senĉesa ekonomipolitika luktado inter konkurantaj kapitalistaj klasoj kaj registaroj. En la kazo de Vjetnamio, ekzemple, ni samtempe oponis la registarojn de Suda kaj Norda Vjetnamio kaj la konkurantajn imperialismojn de Ĉinio kaj de Usono. Ni ne konsideras, ke iu unu imperialismo estas la "ĉefa malamiko", kaj ke do necesas kunagi kun aliaj imperialismoj por venki ĝin.

Ni ne scias, ĉu Esperanto estos la universala lingvo de la socialista mondsocio. Esperanto ja povas esti uzata por antaŭenigi la socialistan komprenon, kiu antaŭnecesas por konstrui socion de abundeco kaj libereco....

*

JAKELINO : 10 jarojn poste...

Antaŭ 10 jaroj, kiam mi estis pli juna, mi verŝajne skribus plurajn paĝojn pri socialismo, kaj la maniero ĝin venigi. Sed mi perdis multe da iluzioj. Nun, mi pensas, ke ĉiam ripetiĝas la sama ciklo :

- homoj ribelas kontraŭ maljustaj regantoj
- kreiĝas nova socio, homoj pli bone fartas
- venas degenero pro la troa facileco de la vivo
- el la ĝenerala degenero leviĝas homoj, kiuj kaptas la regopovon
- reveno al la unua fazo.

La diverseco de la situacio en la mondo venas de tio, ke diversaj popoloj estas je diversaj etapoj de la ciklo. Ekzemple, nuntempe, en Okcidenta Eŭropo, la laborista klaso tiel bone fartas, ke ĝi tute ne deziras ribeli. Intelektuloj, ne planu revolucion dum la somero iun vendredon, ĉar tio estas la vespero de la ludo de Guy Lux ĉe la franca televido ! En aliaj landoj la situacio estas tiel neeltenebla, ke revolucio estas baldaŭa. Tio, kion mi estas skribanta, estas tre malnova, tion jam diris la Predikanto, kies libron Zamenhof tradukis el la hebrea (jes, kompreneble, mi mencias tion, ĉar post mi en la ĉeno estas Garolo, oni sin amuzas, kiel oni povas!). Kompreneble mi esperas, ke mi eraras, kaj ke venos tempo, kiam la tuta homaro estos stabiligita ĉe la stadio de bonfarto. Oni rajtas revii, ĉu ne ? Sed mi vidis en la historio de la homaro jenon :

- romiaj paganoj persekutis tiujn, kiuj ne kredis, ke la imperiestro estas dio
- poste kristanoj persekutis multajn kristanojn kaj kelkajn ateistojn nome de la amo al la proksimulo
- nun ateistoj persekutas ateistojn kaj kredantojn nome de la libereco.

La lasta avataro de tiu procedo estas, ke anarkista laŭtulo pasintjare inventis la liberpensan cenzuron. Kion fari ? Mi ŝatus, ke venu tempo, kiam ne estu malsato, nek malliberaj, nek nekuraceblaj malsanoj, nek malsato inter popoloj. Sed dum ili ankoraŭ ekzistas, mi provas helpi al iliaj viktimoj.

Konkludo : ĉu iu povus doni al la grupo "Francio 89" de Amnestio Internacia efikajn konsilojn pri la maniero decidigi la pakistanajn aŭtoritatojn, ke ili liberigu Imddad Husain Chandio-n ?

Maljakelinadis Jakelino.

Garolo : MONDSOCIALISMO : PRETER LA UTOPIO

La utopio : Tre interesa nia 24a ĉenletero, kaj trafega la enkonduko de Socialista Partio de Grandbritio ; en ĝi estas klare esprimita la utopio same kiel la praktikaj manifestiĝoj de nia socio. La tria paragrafo de la citita enkonduko montras niajn utopiajn sopirojn. Ja nia "alternativa sociordo", nia celo, kiun ni nomas "Socialismo" aŭ "Komunismo", ankoraŭ ne ekzistas ie ajn kaj mi "optimisme" aldonas : ne ekzistis kaj neniam ekzistos... Jakelino (pro sia juneco) songis dum 10 jaroj kaj mi (pro la sama pli fora juneco) dum 35 jaroj.... sed ni konscias pri la utopio : t.e. pri la "neefektivebleco" de tia ideala sociordo, ĝuste pro la avataroj !

La avataroj : Tute ne interesas scii ĉu estas Dio aŭ alia Diablo, kiu kreis la mondon kaj la teruran bestaĉon : la homon (...jes, Jakelino, tio amuzegas min, ke homoj kontentigas sin tiom simple...). La fakto estas, ke kun aŭ sen Biblio, inspirita de Dio kaj tradukita de Zamenhof, la homo estas pekoplana. Oni tute ne bezonas esti religiema por konstati la sep ĉefajn (mortmeritajn aŭ ne) pekojn : orgojlo, envio, avareco, malĉasteco, glutemo, kolero, pigreco, laŭ la kristanoj mem. Sendube pliaj kvalitoj estus troveblaj ĉe la homoj... sed tiuj ĉi avataroj iĝis sufiĉaj por ke nia utopia socialismo neniam efektiviĝu, kaj estu neefektivebla... (tre bela esperanta vorto : neefektivebla!). Kaj ne venu diri al mi, kiel tion faris J.J. Rousseau, ke la homo naskiĝas "bona" (ja bono kaj malbono ne havas apartan, propran signifon) - sed, jes, la socio fuŝas, koruptas la homon.

La homo ja naskiĝas kun siaj naturaj karakteroj, karakterizoj kaj kvalitoj... kaj la socio alportas pliajn koruptaĵojn : la kolektiveco estas plia moderna mito, kie la homoj blinde sin kroĉas por pravigi sian utopian socialismon kaj siajn aliajn sintenojn, intime ligitajn al homekspluatado. (La legantoj de **Laŭte!**, kiuj eventuale ŝatus koni pliajn detalojn pri mia pensmaniero, povas aĉeti mian eseon : "Moderna Mito : La Kolektiveco"... La tuta profito iras ne al mia kapitalista poŝo sed al S.A.T.!).

Antaŭ la Genezo : Ni iom tro facile forgesas, ke la homoj inventis la miton : Kolektiveco, same kiel la pliajn mitojn el Dio, Kristo, Alaho, Budao ks. antaŭ malmultaj jarmiloj. Antaŭ multaj pliaj praaj jarmiloj, en la tiama primitiveco, la homoj havis almenaŭ unu avantaĝon : ili agadis kaj vivis memstare, memsufiĉe... aŭ tuj mortis... La pekoj, kiuj sendube jam ekzistis, estis plene akcesoraj kaj tute negravaj pro la fakto, ke feliĉe ne estis homleĝo sed nur naturleĝo. Vi sendube divenas, ke mi pensas pri la origina ordo de la homoj, homoj, kiuj tiam vivis orde kaj horde en la naturo... en plena - jes, Jakelino - anarkio ! Mi scias, ke estas tre malfacile transporti tian bildon, tian imagon en nian nunan ne sociordon (tio ja estas neebla), sed evolustadion por nova mondkoncepto. Tamen, post 35 jaroj da elreviĝo kaj longa pensado, mi plene konvinkiĝis, ke tiu reveno al la origina ordo (mi ne diras : primitiveco) estas la nura solvo, post la forigo de la mitoj kaj ismoj.

La Ismoj : La ismoj estas evidente la doktrinoj kaj sistemoj de la socio, kiuj katenas la homon kiel individuon kaj malpermesas la atingon de memstareco, de memevoluo kaj memsufiĉ-

eco. Ili estas multaj kaj sendube post la homleĝoj, la kodoj, la moraloj el tradicioj, kutimoj kun kultoj, ritoj, simboloj ktp. ni rememoru, jes, pri ŝtatismo, kapitalismo, naciismo, rasismo k.m.a. ismoj, kiuj estas forigendaj por ke instaliĝu ne iu pseŭdosocialismo, kie miksiĝas konceptoj de "sociala justo" meze de kolektiva pigrado, kun almozado, karitato, hipokritaj kompato kaj helpado (jes, Jakelino), sed vera, ja senkompata (la naturleĝo estas tia : senkompata) solidara mondsocialismo, kie la memstaraj homoj ne petas pri "rajtoj" sed plenumas siajn devojn de homoj en aŭtenta ne nur kunlaboro, sed precipe kooperado.

La Mondsocialismo : Mi ne scias ĉu la legantoj de **Laŭte!** tiel rapide povas senti tiun formon de socialismo, kiu tiom klare aperis en mian... eble memmistifikitan menson. Jes, mi konvinkiĝis, ke sennacieca, anarkia, tutmonda sociordo, kiun oni perfekte povas kompreni kiel mondsocialismon, estos efektivebla post la natura mildigo de la cititaj homaj avataroj kaj post la konsekvenca nuligo de la ĉi-supraj ismoj. Ni tamen plene sciu, ke tio ne estos verko de iu Dio aŭ supera instanco, ŝtato, diktatoro, kolektiva dispozicio, ks. sed peniga individua tasko por ĉiu konscia homo, kiu sciis sin liberigi de la nunaj katenoj de nia sociordo, kaj sciis atingi sian individuan memstarecon, inkluzive por viveltenado. Mi kredas, ke ni, esperantistoj, SAT-anoj kaj similaj liberpensuloj, kiuj, iel, pro atavismo ankoraŭ uzas iajn cenzurojn sed tendencas al tolero, estas sur la ĝusta vojo... kaj kredu, kara Jakelino, ke mi kiel memkonvinkita anarkiisto, plene komprenas kaj akceptas vian amsenton, sendepende de la signifo de ĉi tiu vorto "amo", kiun la homoj hipokrite kapablas prezenti.

GAROLO

P.S. : Espereble ĉi tiu interesege temo : Mondsocialismo alportos tiom da debatoj kaj kunlaboroj kiom la temo : Kvadrato de l'cirklo venigis, kvankam la cirklo restas same ronda (aŭ kvadrata) kiel antaŭe. Mi profitas la okazon por informi la Laŭte-anojn ke en miaj inĝenieraj kalkuladoj mi daŭre uzis $\pi = 3,1416$, kaj ke ĝis la nuna momento tute ne aperis la minimumaj teknikaj problemoj !

*

Bv. korekti, en L! 69, p.43, linio 27 : (problemo : pri mono, ne pri lojaleco al ŝtata reĝimo...). La aŭtoro volis substreki, ke ĉe okcident-eŭropanoj temas ja nur pri mono, ne pri paperoj el laborejo, ktp...



la proletesperantista idealismo antaŭ la unua mondmilito...
(faksimilo de poŝtkarto tiam eldonita de "Franca E-ista Laborista Unuiĝo")

Ĵanseb : PRI MONDSOCIALISMO

Iam antaŭe, mi kredis je socialismo. Sed ĝi ŝajnas ne tre bone funkcii. En ĉiuj landoj, kie ĝi aperis - aŭ ĝi iĝis alispeca sistemo, kiel en Sovetio - aŭ ĝi iĝas enuiga afero, pro manko de enkalkulado de la nemateriaj bezonoj de la homo. Tio estas la kazo en industriaj landoj. En Francio ni spertis ĝin : Ne nur la senlaboruloj estis pli multaj ol antaŭe - kio estas klarigebla pro la ekonomia situacio -, sed ili estas pli mal-
milde traktataj ol antaŭe, materie kaj psikologie. Kaj mi ne parolu pri la leĝpropono pri Esperanto...

Socialismo estas solvo por la problemoj de la antaŭa jarcento : la industria revolucio kaj ĝiaj konsekvencoj - priskribitaj de Zola - igis ĝin preskaŭ nepra. Sed la hodiaŭa mondo, tiu de la atomenergio, televido, robotoj, komputeroj, minitelo, genetikaj manipuladoj... ktp, estigas novajn problemojn, kiujn la teoriistoj de la Socialismo ne antaŭvidis.

Kio gravas, tio ne estas teorioj sed bonvolemaj homoj, kiuj agas por plibeligi kaj plibonigi la mondon, anstataŭ malpurigi ĝin. Iu ajn estu la sistemo, tiaj homoj kreas belecon kaj amon ĉirkaŭ si, ĉiu laŭ siaj fortoj, eĉ kreante teoriojn. Se iu kapablas malkovri teorion por solvi la hodiaŭajn problemojn, sen uzo de perforto kaj sen forigo de libereco, li estu bonvena !

Jopo Orliange : KONTRIBUO al debato pri "MONDA SOCIALISMO"

Laŭ mi, unue necesas bone difini, kio estas socialismo, ĉar kiom da personoj, tiom da komprenoj. Se ni esploras en Larusvortaro, ni trovas jenan difinon : "Nomo de diversaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj doktrinoj, kunligitaj per komuna kondamno al la privata proprumo de la produktaj kaj interŝanĝaj rimedoj".

Ĉe la bazo de la socialismo troviĝas la denunco kontraŭ la sociaj malegalecoj, kiu de Platono ĝis Gracchus Babeuf (Grakis Babif)(en periodo de la franca revolucio, 1789), kuŝis nur sur moralaj konsideroj. Sekve venis teknikaj klarigoj pri la malegalecoj kaj proponoj de panaceoj (Sismondi, Sansimono - Saint-Simon). Tiel en la 19a jarcento naskiĝis diversaj proponoj... (Mi nur citas) : la sansimonistoj kaj ankaŭ la asociaj emuloj kiel Furje (Fourier), Louis Blanc en Francio, Owen (oŭen) en Anglio, unuj por la ŝtata proprumo, aliaj por federacio el produktaj asocioj (kooperativoj). Ĉefe sukcesis nur

la kooperativoj de aĉetantoj. Poste venis K. Marks kaj Engels, kiuj parolis pri scienca socialismo..."

"Marksismo : Soci-politika doktrino celanta per starigo de celkonforma mastromado forigi la plusvaloron, kiun profitas mastro, akcikompanio aŭ ŝtato el la laboro de siaj dungitoj." Laŭ mi, estas eraro paroli pri forigo de la plusvaloro, estus pli bone diri, ke ĝi ne plu fariĝos propraĵo de mastro, sed socia propraĵo.

P. Larus diras, ke "la marksismo ne sin limigis imagi aliigon de la strukturo, sed ankaŭ, ke tiu aliigo estas neevitebla, ke ĝi estas konsekvenco de la kontraŭdiroj internaj al kapitalista reĝimo". Prefere ol kontraŭdiroj, mi dirus : konsekvenco de la kapitalista disvolviĝo kaj malkapablo solvi la problemojn de tiu disvolviĝo. Plie, se oni diras "neevitebla", oni povus konkludi, ke ĉiamaniere, fatale tio okazos, do oni ne bezonas agi por ĝin efektivigi. Laŭ mi, Marks volis diri nur, ke la socio devos nepre ŝanĝi la sistemon, se ĝi volas plene kaj pace profiti de ĉiuj akiritaj progresoj (scienco, tekniko, ktp.).

Estas grava afero, ke unue la socialismo estis morala sento, kiu malakceptas la sociajn malegalecojn, kaj kiu estis por pli justa, pli frateca, pli frateca sociordo. Tiu morala sinteno signifas, ke socialisto ne konsideras siajn proprajn interesojn kaj egoiste agas por tiu celo, sed ke li konsideras ankaŭ la interesojn de siaj kunvivantoj, de la tuta socio, kaj partoprenas malavare al agado por ĉies bono. Sed li vivas en ekzistanta sociordo, do starigas la problemon juĝi tiun sociordon. Ĉu ĝi kongruas al liaj ideoj ? Ĉu ĝi estas perfektigebla, plibonigebla ? Ĉu eblas ĝin anstataŭigi per iu pli bona ?

Laŭ mi, estis K. Marks, kiu pli bone montris la funkciadon de la kapitalismo kaj prognozis ĝian evoluon. Sed kiel diras Larus, li ne limigis sin al tiu analizo, sed proponis kaj agis por anstataŭigo de tiu sistemo. Ĉu, kiel diras la difino, Marks estis por forigo de la plusvaloro ? Laŭ mi, temis nur, ke ĝi ne fariĝu propraĵo de la mastro, sed male propraĵo de la socio. Eble Marks ne klare prezentis la aferon. Ankaŭ pri la maniero kiel okazos la anstataŭigo de la kapitalismo kaj pri kio estos la socialismo. Laŭ mi, li tro simpligis la aferon, parolante pri batalo de klaso kontraŭ klaso, ankaŭ montrante nur aspekton de ekspluatistoj de la kapitalistoj, sed forgesante, ke tiu sistemo efike progresigis la laborprocedojn, la produktadon, kaj do ebligis por la tuta socio pli bonajn vivkondiĉojn. Nur kiam ĝi atingas plenan disvolviĝon (kiel nun), tiam aperas situacio, al kiu ĝi ne povas doni bonan solvon. La solvo laŭ Marks estos la socialismo, sed li prezentis tiun socialismon kiel tro perfek-

tan institucion facile atingeblan, kiu efektivigos la senklasan socion. Bedaŭrinde, la afero estas ne tiel simpla, kiel li kaj ankaŭ Lenin opiniis. Ili sincere kredis tion kaj oni ne povas ilin kulpigi.

Kio okazis en Sovetio estas instrua. 1. La revolucio okazis kiel kontraŭstaro al milito kaj mizero, sed la granda amaso ne konsciis pri kio estas komunismo ; estis nur unu politika partio kaj interne de tiu partio malmulte nombraj gvidantoj, kiuj prenis la politikan povon. Tiel oni trudis al la plimulto solvon, kiun ĝi ne bone komprenis. Tio estis la unua malfacilaĵo, kiu ankaŭ influis sur la sekvontaĵoj. 2. Plie, la lando ne estis bone industriigita kaj la milito damaĝis multe. 3. La kontraŭrevoluciuloj ricevis imponan helpon de ekstere, la revoluciuloj malmulte. Mankis, ke la revolucio disvastigu al aliaj landoj. 4. Eble estus bone, se en la unua tempo oni estus lasinta funkcii laŭ la merkato la malgrandajn entreprenojn, komercojn, farmojn, kion oni poste permesis per la N.E.P.

La socialistoj devas pli bone vidi la aferon, **1^a** pli bone taksi la malfacilaĵojn, ne promesi socion sen problemoj, kiu funkcios glate kun mirindaj vivkondiĉoj. Oni ne devus naski iluziojn neplenumebajn, kaj paroli pli vere. En unua tempo temu nur pri malpliigi la diferencojn, funkciigi planitan ekonomion por bone kontentigi la bezonojn, plejeble doni eblecon al ĉiuj laborkapabloj partopreni al la necesaj taskoj. Por bona sukceso de socialismo necesas : 1. ke la granda plimulto ĝin komprenu kaj deziru. 2. ke ĉiuj plenumu akurate siajn devojn kaj respektu la moralon. 3. Mi opinias, ke ĝi eblas nur en landoj bone ekipitaj. 4. Ĝi bezonos bonan solidaron de la laboristaro el aliaj landoj.

En Sovetio, eĉ se ne estus regintaj Stalin kaj burokrataro, por efektivigi industriigon kaj modernigon, ekipi la landon, necesis kapitalo. Kaj kiel oni povas konsistigi kapitalon (eĉ se ĝi estas socia propraĵo) sen tio, ke tiuj, kiuj laboras, ne konsumu la tuton de sia produktaĵo, kaj ke parto utilu por konsistigi tiun kapitalon? Do, evidente, la rusaj laboristoj ne povis tuj ricevi bonan salajron. Ankaŭ la necesa defendo de la revolucio necesigis grandajn elspezojn. Tion mi diras ne por senkulpigi la fian Stalinon, sed por montri, ke eĉ sub laborista povo tio ne estas tiel simpla kiel iuj kredas aŭ pretendas, por efektivigi socialismon.

Ĉu monda socialismo ? Certe tio estus dezirinda. Eble en kapitalistaj landoj ĝi estos sufiĉe facile efektivebla. Sed ni ne havu iluziojn. Ĝi ne okazos samtempe en ĉiuj landoj. Se oni volas praktike atingi rezulton, tio okazos neniam,

se oni atendas ke ĝi ĉie okazu. Tamen, por bonaj rezultoj necesas, ke ĝi okazu en sufiĉe vasta areo, ankaŭ ke ĝi havu bonan helpon en aliaj landoj kaj ke kiel eble plej rapide ili sekvu tiun ekzemplon. Certe la ekonomia kapitalista sistemo jam konkeris grandparton el la planedo, sed espereble kontraŭ sama plago la popoloj uzos saman kuracilon.

La progresado de la socialistaj ideoj baziĝis ĉefe sur la defendo de la laboristaj depostuloj, kaj en klasa batalo helpis la laboristaron akiri pli bonajn vivkondiĉojn. Nun granda parto el la laboristaro havas sufiĉe bonan staton kaj eĉ tre bonan por la superaj tavoloj. Mi opinias, ke estus demagoge pretendi ĉiam pligrandigi la salajrojn. (Eble, en socialismo oni ne devus paroli pri salajro, sed pri enspezoj ? ne gravas!). La grava problemo estas la senlaboreco kaj la ĉiama pliampleksigo de la armado. Do necesas organizado de la laboro por ke ĉiuj laborkapabloj havu eblecon ĝin partopreni. Pri la milita danĝero mi opinias, ke ĉiu provo de socialisma starigo bezonas tamen sin defendi, sed tiu bezono estos des malpli granda, ju pli socialismo estos disvastiĝanta kaj ricevanta solidaron en aliaj landoj. La socialistaj landoj starigu rilatajn regulojn permesantajn kunvivadon pacan kaj solidaran. Ili serĉu ankaŭ, ĉu eblus akordoj kun aliaj landoj por malarmado kaj pacaj rilatoj. Ĉu tio estas iluzioj? tute ne realigeblaj?

Mi havas simpation al la proponoj de la abundistoj, almenaŭ kiel principoj. Por ilin praktike efektivigi oni bezonas, laŭ mi, serĉi alireblan vojon, pli atentigi kiel oni povus ilin funkciigi.

J.G. : Pri la socio proponata de la Socialista Partio de Grand-Britio mi tute konsentas. Oni retrovas la ideojn de la Abundistoj kaj de la liberecanaj socialistoj, sed la problemo, laŭ mi, estus kiamaniere atingi tiun socion.

Pere de perforto oni uzas la samajn rimedojn kiel la regantoj : armilojn, hierarkian strukturon. Vidu la diversajn gerilojn : la rezulto estas nur anstataŭigo de estroj. Pere de balotado : kiam oni observas la politikan situacion en la t.n. "dissolvigintaj landoj" estas du blokoj : la dekstruloj kaj la maldekstruloj aŭ la konservativuloj kaj demokratoj, kiuj finfine praktikas la saman politikon : bone regi la kapitalisman socion por ke ĝi plibonigu la konkuradon de la naciaj ekonomioj fronte al la aliaj landoj. Tion ni povas konstati en Britio, Francio, Federacia Germanio, Usono ktp. En la orientaj landoj, eĉ se ili sin nomas "socialistaj", ili anstataŭigas la tradicion kapitalisman per la ŝtatkapitalismo kun ankoraŭ pli da malsukceso en la ekonomiaj rezultoj. Nur kelkaj malgrandaj (fino p.28)



LA "KVARA MONDO"

"En nia lando ne estas plu malriĉuloj. Ĉiu estas nutrata, ĉiu almenaŭ manĝas laŭ sia apetito". Kiomfoje mi aŭdis tiajn vortojn el la buŝo de homoj, kiuj ne scias, pri kio ili parolas, ĉar ili ĝuas bonan apetiton kaj povas ĝin satigi, kaj neniam suferis malsaton.

Tamen ili posedas televidilon. Ili scias, ke amasoj da homoj mortas pro malsato. Sed tio okazas en tiel foraj landoj, ke ŝajne tio ne koncernas ilin. La "tria mondo" estas por ili kvazaŭ abstraktaĵo.

Kaj ili ne scias (aŭ ne volas scii?), ke en ilia lando mem, en ilia urbo, preskaŭ ĉe ilia pordo, ekzistas "kvara mondo", kiu, se ne mortas, tamen kaŭras en mizero. Se, kiel mi, ili ĉiumatene irus al la urba bazarhalo, ili vidus ĉirkaŭ ĝi, sidantaj sur la trotuaro, plurajn almozoŭlojn el ambaŭ seksoj kun tabuleto, sur kiu ili legus : "Mi malsatas". Eble ili dirus : "Sentauĝuloj, malpenemaj, kiuj preferas almozpeti ol perlabori sian panon per praktikado de honesta metio." Sendube ekzistas kelkaj tiaj individuoj, profesiaj almozoŭloj, sed pli multaj estas la veraj senlaboruloj, kiuj dum monatoj kaj jaroj vane serĉadis hipotezan dungon. Tiuj ricevas kelkan tempon magran kromsalajron, poste ŝtatalmozon po 40 frankoj tage, poste neniom plu. Kiel tiuj ĉi sin vivtenadus, se ne per ŝtelado aŭ almozoj ? Ĉu per "nigra laboro" ? Sed ankaŭ sur tiu ĉi labormerkato ekzistas akra konkurenco.

Ni scias, ke tia "kvara mondo" nun vivas en ĉiuj "riĉaj" landoj. Ni vidis sur niaj televid-ekranoj, en Usono, senlaborulojn ofte dece vestitajn (ĉar ili estas freŝdataj malriĉuloj) vicatendi kun malplena bovlo en la mano ĉe popolaj supdisdonejoj. Tiaj spektakloj estas videblaj apud ni, bone nutrataj homoj, apud luksaj restoracioj, en kiuj riĉuloj ofte elspezas

plurajn centojn da frankoj por unu vespermanĝo. Ĉu tio estos ankoraŭ longtempe tolerebla ?

La 3an de novembro, en la televida elsendo de Mikaelo Polac (en Francio, ndlr.) mi aŭdis korskirajn atestojn de senesperaj senlaboruloj. Tie estis ankaŭ pastro Petro. Ĝenerale mi ne multe ŝatas klerikojn, sed antaŭ tiu ĉi mi demetas mian ĉapelon. Pastro Petro parolis ne longe, sed dense. Li estas ne nur sentimentala bonfaranto, cetere efika, sed ankaŭ inteligenta klera homo, kiu serioze, funde esploris la demandon. Kaj kion li konkludis ? La nuna tutmonda krizo ne estas cikla krizo kiel la antaŭaj. Ĝi estas daŭrema. La homaro venis en novan stadion de sia evoluado. Ne temas pri pasema epidemio, sed pri kronika malsano, tute nova, por kiu necesas eltrovi tute novajn kuracrimedojn.

Guste tion, antaŭ duonjarcento, profetis Jacques Duboin. Kaj li proponis solvon : "Kiam ne plu estas necese pagi laboriston, por ke li produkti, la ŝtato devige pagu lin, por ke li konsumu." (citita en kompilaĵo de Kdo Naudé sub titolo "Ekonomio", en **SAT-Amikaro** de oktobro 1984, p.65).

Tiel longe, kiel oni ne volos tion kompreni, tiel longe kiel la politikaj instancoj kaj partioj restos ĉe siaj malnovaj konceptoj, la tria kaj la kvara mondoj dronos en pli kaj pli profunda mizerstato.

APUD LULILO DE NOVNASKITO

Mia pranepo Francisko naskiĝis antaŭ 17 tagoj. Tiu estuleto estas kompreneble la plej bela bebo en la mondo. Vidu ĝin, kiam ĝi laŭte ploras kaj krias por postuli sian manĝon, kiam ĝi vigle ŝukas la bonan lakton de la patrineto, kiam ĝi satigita kviete dormas kun fermitaj pugnetoj ; aŭ kiam ĝi scivole ĉirkaŭrigardas, portate en la brakoj de sia juna patro, kiom fiero !

Inter liaj ok gepraavoj, kvar estas forpasintaj, restas kvar. Se ni vivos ankoraŭ tri jarojn plu, eble li iom memoros pri ni, aŭ almenaŭ li aŭdos de siaj gepatroj.

Ci, hometo de la 21a jarcento, kiom da novaj aferoj ci vidos, kiujn mi ne povas eĉ imagi ? mi, kiu konis en mia longa vivo la aŭtomobilojn kaj la aeroplanojn, la submarŝipojn kaj la raketojn, la telefonon kaj la kinematografon, la radion kaj la televidon, la vojaĝon de Gagarino, la senpezajn moviĝojn de kosmonaŭtoj ekster ilia spacoŝipo, la unuajn paŝojn de homoj sur la luno ; la elektroteknikon kaj la elektronikon, la fridoŝrankon kaj la lavmaŝinon, la radaron kaj la laseron, la robotojn kaj la komputerojn, la plastojn, la atombombon kaj la

nuklean energion ; la vitaminojn kaj la antibiotikojn, la greftojn de organoj kaj la arte koncipitajn bebojn... La inventoj kaj la efektivigoj sin sekvas en akcela rapido... Kion ci vidos, spertos, uzos ?

Sed ĉu ĉio ĉi celas al pli feliĉa ekzistado ? Ĉu ci vivos pli agrable ol ni ? Ĉu ci ĝuos universalan kaj senfinan pacon, aŭ ĉu impetos sur la homaron la teruro kaj abomeno de tria mondmilito kun eĉ pli efikaj amasmortigiloj kaj neimageblaj plagoj ? Ĉu la homoj scipovos dividi egale inter si la laboron kaj ĝiajn fruktojn, la nutraĵojn kaj la komforton, la distrojn kaj la kulturon ? Ĉu, unuvorte, la homaro fine fariĝos saĝa ?

Kara homideto, mi pensas pri cia estonteco kun mikso el timo kaj espero. Sed mi ne estos plu tie ĉi por konstati, kio sekvos.

en Tuluzo, Julio 1986.

LA VIVO PLU DAŬRAS

En mia libreto "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" mi nomis 215 esperantistojn, kiujn mi pli-malpli konis. El tiu nombro pli ol cent estas jam forpasintaj, pluraj de post la apero de la broŝuro. Entute, inter miaj amikoj kaj konatoj, estos baldaŭ pli da mortintoj ol da vivantoj. Ĉiu jaro plilongigas la funebran liston.

Tiu malgaja konstato emigus min al jena pesimisma konkludo : se mi vivos ankoraŭ kelkajn jarojn, mi vidos la esperantistaron daŭre ŝrumpi, senhelpe irante al fina neniigo.

Feliĉe, mi restas en kontakto kun la movado. En niaj kunvenoj, kune kun malnovaj anoj, mi vidas solidajn mezaĝulojn kaj ridantajn vizaĝojn de viglaj gejunuloj. La kongreso de UEA en Budapeŝto estis rekorda laŭ la nombro de partoprenantoj. El popola Ĉinio ĉiumonate venas informoj : tie kolektiĝas kaj kreskas diligenta kolegaro. Post la periodoj polarus, germana, franca, hungara, nederlanda kc., eble sin anoncas kaj sin preparas ĉina periodo. Nu, ni ne forgesu, ke nun el kvin homoj estas unu Ĉino. Jen estas do pluginda grundo, kiu eble promesas riĉan rikolton.

Ni ne malesperu. La pioniroj malaperis, la sekvantoj - ni - iom post iom iras la saman vojon. Sed la anstataŭa taĉmento jam naskiĝis. Ĉiam levigas novaj freŝaj fortoj.

Mortas esperantistoj, sed daŭre vivas kaj vivos Esperanto.

Ni malhavas 300 kg-ojn da pano aŭ rizo, jare, por ĉiu terano, sed ni ja disponas por ĉiu 15 000 kg-ojn da eksplodiloj.

Jean GOSS

JULNOKTO EN VIENO

Jam de pluraj tagoj ni ne plu rajtis la mallongan promenadon matenan. La neĝo amasiĝis sur la korto, ĝi ŝajnis premege la prizonon per sia peza silento...

Ege frostis, ni frostotremis en niaj ĉeloj, krispiĝante sub nia truita kovrilo. Mia amiko Boris, la juna jugoslava doktoro, kiu kunloĝis en mia ĉelo, antaŭe en tiu vespero longe parolis al mi pri sia lando... En sia pitoreska franclingvo, li rakontis la malnovajn slavajn tradiciojn, li dolĉe kantis kelkajn el tiuj nostalgiaj melodioj, kiujn oni kutime fiore rekantas en la serbaj kamparoj dum la Julnokto.

Li estis, plorante, elvokinta la rememoron pri sia maljuna patrino, kiu, tie for, jam de longatempe atendis lin, kaj kiu verŝajne neniam plu revidos sian filon.

Ni ambaŭ profunde absorbiĝis en niaj malĝojaj pensoj... La pasintaĵoj defilis antaŭ niaj okuloj. Mi revidis Parizon, miajn tiel karajn amikojn ; mia perdata libereco hantis miajn revojn...

Kaj la terura frostado daŭre malebligis al ni trafi la tiel deziratan dormon. La malsato vakuigis niajn cerbojn...

Estis Julio, kaj ni estis en Vieno ! Por ni, proskribitoj, nenio signis tiun daton. Ni jam ne plu estis de tiu ĉi mondo. En la urbo de Strauss kaj Schubert, kunigite ĉirkaŭ la familia tablo, oni sendube ĝoje festenis...

Ŝajnis al ni, ke ni aŭdetis ridojn kaj muzikon filtriĝi tra la dikegaj muroj...

La horloĝo grajnigis la horojn, unu post alia... Noktomezo!... Ĝi estis nia lasta Julio!... Ni ĉiutage atendis la verdikton de la Gestapo, ni nenion plu esperis...

Subite, ŝlosbruo ekstremitis nin ! paŝoj alproksimiĝis, la seruro grincis...

Kiam la pordo de ĉelo malfermiĝis dumnokte, ni sciis, ke ĝi anoncis la morton ! Oni eliris por neniam plu reeniri. Malben' ! Ili do elektis ĉi tiun nokton kun superege rafinita krueleco ?

Senspire, ni atendis !

La lampo ne eklumiĝis...

Lumigante al si per sia lanterno, envolvita per sia nigra mantelo, la provoso alproksimiĝis al mia litaĉo kaj prenis mian manon. Mallaŭte li rapide flustris :

"Kamaradoj, endas, ke vi ne estu malĝojaj! Ĉi tiun nokton renoviĝas nia granda espero ! Vi baldaŭ estos liberaj. Mi alportas al vi la saluton de tuta popolo, kiu suferas kun vi, skla-

vo, kiel popolo via. Mi estas maljuna ; kontraŭ mia volo oni faris min provosaĉo ; mia edzino estas tre malsana. Tiu ĉi milito forprenis de mi unu filon ; la alia estas ĉe la fronto, li estas dudekjara, mi scias nenion pri li. Kuraĝon!" Kaj li rapide foriris, post kiam li donis al mi etan paketon.

Ni estis plorantaj, kun koro fandita de kortuŝiteco ; ni sentis, emociegitaj de tiuj kelkaj vortoj, kiom ni estis proksimaj unuj al la aliaj en nia mizero.

Mi konservis la etan abian frondon, kiun ci alportis al mi, aŭstria kamarado, kaŝitan sub mia pajlomatraco en "Marga-rethena"-karceron dum ja longa tempo. Ĝi akompanis min en Mauthausen ! Tie, mi ĝin perdis kun la cetero... mi estus volinta ĝin kunporti hejmen, kiel simbolon... Kiel ajn estu, mia plej bela Julrememoro restos, dank'al ci, la Julnokto dum kiu mi ekkonsciis unu fojon plian, ke la subpremataj homoj estas homfratoj.

Se ili povus tion kompreni... ankaŭ ili!...

Petro Jayer (matrikulo 138044) (Parizo, 1945)

elfrancigis Denise Castello.

Notoj : **Julio**, laŭ PIV, estas la nomo de antikva pagana festo en Nord-Eŭropo, poste anstataŭigita per Kristnasko.

Pli ol 40 jarojn poste, la aŭtoro ne povas travivi tiun jarepokon sen pensi kun ĉagreno pri la miloj da homoj, kiuj ankoraŭ dum tiu julnokta festo kaj multaj aliaj tagoj kaj noktoj ĝemas en malliberejoj aŭ koncentrejoj por la sola motivo, ke ili ne pensis kiel la potenculoj de la lando, kie ili vivas...

Pako la tria :

ESTAS TIEL

*Estas necese
kaj konvene, komprenu,
ke malsanoj ne venu,
ke vi kresku senĉese.
Oportune kaj dece
estas tiel sopiri,
ĉar por antaŭeniri,
Joĉfo, estas necese.*

*Estas danĝere
en ĉi tiu medio
vivi kun la defio
resti longe surtere.
Tamen lernu parkere
kaj batalu sen timo,
ĉar ja fali en ŝlimo,
Joĉfo, estas danĝere.*

*Estas domaĝe
jenan mondon heredi
kaj vidiĝi sen pledi
tutan vivon enkaĝe.
Konkuregi sovaĝe
iĝis nia devizo ;
vin ne helpos avizo,
Joĉfo ; estas domaĝe.*

*Estas mirige,
malgraŭ tiom da baroj
kaj nesongaj koŝmaroj,
ke vi ĝojas pervive.
Konsidere kaj vide
en mond' nur detrucelon,
ke ĉi merd' naskas belon,
Joĉfo, estas mirige.*

PRI VIRA FANFARONEMO KAJ LITERATURO

Ŝi ĵus, mire, legis
premitan fikciaĵon
en omaĝa iu libro
en rilato kun la temo
"limoj en delegiteco".

Nu, ŝi scias
ke ne samas
literatur' kaj realo.
Tamen, ĉiam tiaj verkoj
ĉerpas erojn el spertaĵoj,
kiujn ili
arte knedas,
kun efektoj
pli malpli
briletaĉaj.

Kaj tiel eksciis ŝi ĵus,
ke dum jaroj en ...,
estis delegito ne ŝi,
sed LI - tiama edz' !
Vere, dubo ŝin invadus,
se ŝi ne povus kontroli
sur breto de bibliotek'
ke plu kuŝas leterfasko :
tiom alvenis da ili,
dum ŝi - ne li! -
delegitis,
kaj respondis
al ĉiu esperantisto
bezonanta ian servon.

Nu, ŝi scias : LI kunhelpis,
LI ŝoforis, k.t.p.is ;

sed de tio, al aserto
- eĉ fikcia! - ke LI "estis
la sola U.E.A.-delegito.
Probable eĉ la sola esperantisto
en la tuta vasto
de la landa teritorio"...
Nu, certe ŝi stultas,
sed ŝi opinias
ke eĉ pro fikcio
- eĉ por premio! -
verkanto ne rajtas,
se iom honesta,
preteksti fikcion
por fakte glorigi
sin mem per malveraĵ'
... tiel virkokaĉa!

Sed delonge Bodler'
disigis moralon
kaj arton.

Kien irus la mond'
se l'edzina koler'
priombrus la gloron
de l'edza artisto ?

Ni konfese diru :
plaĉas al ŝi nun pli
ol iam ajn, ne plu
esti edzin'
...ĉefe de artisto !

L.N.

La spirito de COLUCHE (kolüŝ'), franclingva komikisto :

* Kiam mi vidas ulon, kiu havas nenion por manĝi, kaj kiu iras voĉdoni, tio pensigas min pri krokodilo eniranta en sakvendejon.

* Estas tri milionoj da homoj, kiuj petas laboron. Tio ne veras, al ili mono sufiĉus.

* Kiam vi ekvidas policistaĉon sur strato, tio signifas, ke ne plu estas danĝero ; se ne, la policistaĉo ne estus tie.

* En la sovetiaj oficejoj estas malpermesite akvi la florojn, ĉar tio rustigus la mikrofonojn.

ESPERANTO GIRONDE

Datoj de la venontaj kunvenoj :

en januaro :

* sabaton, la 24-an, je la 15 h. en Palmer

Temkunsido : Reaktualigado de nia propagandmaterialo. Jam iom pripensu la aferon...

en februaro :

* mardon, la 3-an je la 19h. en Palmer : grupkunveno.

* sabaton, la 14-an je la 15 h. en Marcenais : Temkunsido : Krespotago !

en marto :

* mardon, la 3-an je la 19 h. en Palmer : grupkunveno.

* sabaton la 7-an kaj dimanĉon la 8-an : 1-a E-staĝo en Artigues-près-Bx.

* vendredon la 20-an, sabaton la 21-an, dimanĉon la 22-an : Forumo de la Asocioj en "Espace TATRY" (crs du Médoc, Bx), E-budo kaj -animado.

Raporto pri la ZAMENHOF-tago (14-an de decembro 86)

en Eysines GRANDEGA SUKCESO !!!

Pli ol 70 gepartoprenantoj ! multaj gejunuloj, venintaj ne nur el Ĝirondio sed ankaŭ el Dordonjo, Tarn-Garonio, Lot-Garonio kaj Atlantikaj Pireneoj. Matene kiel kutime ĉiuj grupoj raportas pri siaj aktivaĵoj : Ste Foy, Libourne, Le Fleix, Montauban, Cenon, Eysines, Périgueux.

Ekde la 11-a h. la ĉeestantaro "kobaje" provas la sistemon de diskuttrondoj laŭ lingvoniveloj.

La grupo de la gekomencantoj estas la plimultnombra. Tie en varma etoso ni parolas franclingve pri... Esperanto! **Simonne** kaj **Gaita** gvidas la debaton.

La grupo de la geprogresantoj kunigas geesperantistojn, kiuj bone komprenas, sed ĝenerale ne kuraĝas esprimi sin en E-o. **Captein** kaj **Joel Laporte** gvidas "tikletan" paroladon pri... bordeloj! Supozeble inter aliaj temoj.

La grupo de la geparolantoj estas minimuma sed tamen vigla. Tie ni parolas nur en E-o, i.a. pri la neceso de daŭra lingvo-instruado, -lernado. Kiu ne lernas, malprogresas ĉar forgesas !

Ĉiuj kontentas. Rezultas, ke E-semajnfinoj estas nun organizendaj !

Dum la manĝo ni ankoraŭ pli rimarkas la grandan laboron de **la tuta Eysines grupo**. Ni vere devas danki kaj gratuli ilin ĉiujn. Cetere la kuskuso estas tre bongusta.

Posttagmeze **Leo** prezentas muntaĵon pri "**vivo en Ĉinio**". Pagodoj, bicikloj, rizo, teo, silko, kotono, bonhumoro de la infanoj... neniu simbolo de la ĉina vivo mankas.

Post la krespopaŭzo kelkaj kantoj animas la finon de tiu bona tago.

Fulmrapide pasis la horoj. Ĉiuj konservos bonajn rememorojn pri tiu ZAMENHOF-tago 86 en Eysines. Denovajn dankojn kaj gratulojn al la georganizantoj.

Ĥaosa Zamenhof-tago en EJZINO

Tujas mi per aserto, ke la celo de ĉi tiu artikolo ne estas kulpigi iun onon, nur nomi kaŭzon, por ke organizantoj en la estonto evitu ĝin. La ĉefa kaŭzo estas manko de harmonio inter la organizantoj. Almenaŭ mi supozeble opinias, ke la organizintoj ne deziris la Ĥaosan programon de la Zamenhofa tago. La sabatavespera renkontiĝo ne okazis, sekve en la dimanĉa mateno perdiĝis pluraj kvaronhoroj per preparaj laboroj kaj la akceptado de novalvenantoj. Due mankis tagordo por anonci la programerojn. La vortoj "konversacio laŭ libervolaj temoj" sufiĉis por krei Ĥaoson kaj anstataŭ tio oni komencis per raportado pri minimumaj sukcesoj kaj maksimumaj fiaskoj. Ĉu por honori Zamenhof ?

Poste oni dividis la ĉeestantaron en grupojn laŭ lingvonivelo (spertaj esp-istoj, malpli spertaj, kaj ne esp-istoj) ankaŭ kun libervola temo. La celo estis provi staĝon, kiun oni en baldaŭa estonto volas organizi publike. Certe por tia celo oni nepre bone devas prepari programon kun fiksitaj periodoj kaj komunan kunvenon por resumi la rezultatojn. Pro la longdaŭraj raportoj mankis tempo por efike ellabori tiun programeron. La paroladoj antaŭ la honorvino jam okazis, kiam mi revenis en la salonon. Feliĉe, ĉar mi ne komprenas la francan helplingvon.

La tagmanĝo. KUSKUSO. Kiel vegetarano, mi kunportis mian manĝon, sed por respekti mian principon oni metis grandan pladon da kadavraĵoj tuj antaŭ mian nazon. Dankon !

Distra varietea posttagmezo. Kompreneble la abunda manĝado de la kuskuso postulis pli da tempo ol planite kaj ĉar la manĝejo estis la sama loko por distri nin, oni per komuna forto devis ordigi la seĝaron por montri diapozitivajn pri la vojaĝo tra Ĉinio, kies longa eksplikado okazis franclingve. Post tio restis malmulte da tempo por muziko kaj kantado de kelkaj kantoj. Dume pluraj ĉeestintoj devis foriri por povi atingi sian hejmlokon. Mi scivolas, ĉu ankaŭ aliuloj sin preparis por prezenti ion ?

19861215 (2K18) ĉeestinto

RECENZO

Dum la 3-a Rodana Esperanto-Rendevuo de L.F. Koop. en Avignon (Château de la Barbière - 18-19an de oktobro 1986) okazis grava teatra premiero : "**Kandid**" de Voltaire en esperanta traduko far E. Lanti, unufoje surscenigita.

Tiun spektaklon kreis la trupo "André Morel". La prezentado ampleksas unu horon kaj duonon. La teksto de Lanti estis parte adaptita : kelkaj ĉapitroj estis forigitaj dum aliaj aperas sub formo de kantoj (laŭ esperanta aranĝo de H. kaj A. Gente).

Pri la rolanto mem : André Morel estas teatra profesiulo kiu sursceneje sole aktoras dum la tuta spektaklo. Oni devas precizigi ke la aktoro multfoje

prezentis la francan version ĉu en Francio mem, ĉu eksterlande, antaŭ ol proponi la esperantan (por tion atingi, li devis lerni la lingvon antaŭ nur dek ses monatoj!).

Spite la malmultan tempon dediĉitan al la lingvo-studado, la rezulto vere elstaras (ĉu pro la kvalita prononco, ĉu pro la fideleco al la teksto).

Rilate la teatrajn rimedojn, A. Morel kompetente sin turnis al la diversaj teknikoj de la fabelarto : dialogoj kaj mask-ludoj, voĉa enkarnejo de diversaj roluloj, rekta kaj simbola uzado de multaj akcesoraĵoj. Bonkvalita muzika akompanado de la teksto kaj de la kanzonoj reliefigas certajn kulminajn partojn de la enscenigo.

Ĉio tio harmonie fandiĝas kaj tiel kreas vivoplenan kaj kolorriĉan spektaklon kiu scipovis kapti la atenton de la spektantaro dum la tuta daŭro de la prezentado.

Nepridubbele, la teatra versio de tiu fabelo, vera reveno al la rakonta tradicio, estas ĉefverko. A. Morel atingis tian altan celon dank'al sia elstara teatrokonscia personeco.

Nun restas nur esperi ke ĉiuj teatremuloj taksos nepre devige ĉeesti tiun brilan teatraĵon proponitan de nia freŝdata kaj talenta esperantista aktoro.

Recenzis Sylvaine Le Magadure
kaj Daniel Moirand, Aix-en-Provence.

Post la monda premiero en Avignon en oktobro '86 la Kompanio André Morel prezentos denove al la esperantista ĉeestantaro de VAISON-la-Romaine sian spektaklon **Kandid** de Voltaire en la traduko de Lanti (muziko kaj paroloj originalaj).
A.Gente

42a Kongreso de SAT-AMIKARO VAISON-LA-ROMAINE (18/20. Aprilo 1987)

La kongreso de SAT-AMIKARO okazos en la urbo VAISON la Romaine dum Pasko 1987, jubilea jaro de esperanto. (18a ĝis 21a de aprilo 1987) en la Kultura Centro "A Coeur Joie". Tiu ĉi Centro estas tre bone ekipita por akcepti nian kongreson laŭ tre taŭgaj kondiĉoj. En belega kadro, ni trovos surloke ĉion necesan por dormi, manĝi, kongresi... kaj turismi. La ĝenerale agrabla vetero dum Pasko ebligos al la partoprenantoj malkovri la ĉarmecon de tiu mondkonata, arkeologia urbeto situanta piede de Monto VENTOUX.

Profitu la okazon trapasi kelkajn tagojn sunbrilajn en Provenco, je tre modera prezo, kaj malkovru altturisman regionon kiu entenas interalie, la sudajn Alpoj, le Luberon, Avignon, Fontaine de Vaucluse, les Baux de Provence, les Saintes Maries de la Mer, ktp...

Petu informojn al : S-ino Gemma RASSOUW, Chemin Sainte Croix
84110 VAISON LA ROMAINE (Francio) kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono.

La Girondia Grupo proponas belajn kvarkolorajn afiŝojn (30cm x 40cm). Ili estas kreitaj de la reklamfako de la profesia liceo "Toulouse-Lautrec" de BORDEAUX. Teksto : "ESPERANTO - Langue universelle - Abolissons la barrière des langues". Unu afiŝo kostas 3 FF. Sendokosto plie. Por ĉiuj mendoj, ekde marto 1987, turnu vin al Ginette GABILLON, 32 rue Renault, 33200 BORDEAUX CAUDERAN.

Nia kriminala felietono

* Nia samideano Joël Thimeur ne liberigis, kaj oni esperas, ke li liberigis la 6an de februaro 1987. Arestite en februaro 1986, li estis kondamnita al 1 jaro da mallibero pro sia rifuzo obei la ordonon surmeti uniformon. Ĉar li kondutis nek pli bone, nek pli malbone, ol aliaj francaj malliberuloj, li ricevis unu monaton da redukto de la puno, kio estas normala afero laŭ la franca juro. Sed intertempe li ricevis la viziton de reprezentanto de la armeo, kiu sciigis al li, ke, se li restos mallibera dum malpli ol unu jaro, la armeo denove postulos, ke li soldatservu. Kompreneble, li plu rifuzus, kio signifus, ke li estus denove arestita, denove juĝita, denove malliberigita. Post diskutado kun la direktoro de la malliberejo kaj kun la juĝisto pri aplikado de la punoj, li ricevis la rajton resti unu monaton pli en la malliberejo. Kiom ĝoje, ke nun la Franca Respubliko havas ŝtatestretarion pri homrajtoj! Ni esperu, ke la 6an de februaro Joël estos definitive liberigita, kaj povos ricevi sian lokon en la esperantistaron. Lia nuna adreso estas : Joël THIMEUR, Maison d'arrêt de Caen, 10 rue du général du Parge, 14000 CAEN, Francio.


* Laŭ informo de "Avis de recherches", Daniel Muller atendas sian proceson kaj viajn bildkartojn en la arestejo de Strasburgo. Nia loka korespondantino provos scii pli. Lia adreso estas : Daniel MULLER, Maison d'arrêt de Strasbourg, 2 rue du Fil, 67070 STRASBOURG Cedex.

La federacio LANGVEDOKO-RUSILJONO informas pri sia kongreso en Collioure, la 9an kaj 10an de Majo '87. Partoprenos Sud-Katalunoj.

- * pri lingva staĝo apud AGDE (de la 27a ĝis la 31a de Majo)
- * pri karavano al Varsovio por aŭtomobilistoj kun tendo aŭ ruldromo (foriro meze de Julio, reveno la 10an de Aŭgusto).
- * pri aŭtobuso al Varsovio, foriro el Montpellier la 23an de Julio.

Skribu al : Jean Hénin, Route de Montcayroux, 48500 LA CANOURGUE

EKSPLIKOJ/PIKOJ/REPLIKOJ/EKSPLIKOJ/PIKOJ/REPLIKOJ/



RESPONDAS ABSURDULO AL JAKELINO

(Vd. L: 69 : "Pri kelkaj absurdaĵoj")

Kara Jakelino, se vi ne ekzistus, necesus inventi vin. Kaj ne prenu tion ĉi por ironio : ĉar viaj subtilaj paradoksoj trudas nin rekonsideri niajn plej firmajn opiniojn kaj konvinkojn.

* Sennaciismo baziĝas sur **konfuzo inter nacio kaj ŝtato.**

Demando : kio faras el bretonoj, alzacanoj, okcitanoj, katalunoj, vaskoj kc., francojn, se ne la fakto, ke ili apartenas al unu regno regata de unu ŝtato ? Ĉu ankaŭ la fakto, ke ili estas samlingvaj ? Sed

1. tiu samlingveco estas al ili trudita de la ŝtato, de reĝo Francisko la 1a ĝis la lernejo de Jules Ferry en la respubliko unu kaj nedividebla.

2. la franclingvaj belgoj kaj svisoj tamen ne estas francnacionoj.

* **Hazardo**

Vi komparas nacion kun sekso, kaj ni sennaciistojn kun eŭnukoj. Nu, en la franca lingvo oni prave diras : Comparaison n'est pas raison - komparo ne estas racia rezono. Oni naskiĝas vira aŭ ina pro natura hazardo, oni naskiĝas franco aŭ belgo pro historia hazardo, kiu arte fiksas landlinion inter la du regnoj.

Vi, kiu iam loĝis en Strasburgo, certe konis samurbanajn, kiuj estis germanoj ĝis 1919, poste francoj ĝis 1939, denove germanoj ĝis 1945, kaj ankoraŭfoje francoj. Ĉu ilia nacieco ne variis laŭ historiaj hazardoj ?

* **Ĉu estas reala nur tio, kio estas eterna ?**

Jen ni renkontas grandan argumenton de la kontraŭuloj al sennaciismo : nacioj nun ekzistas, tion ni devas agnoski, kaj ne ŝanĝi. Ĉu tio, kio nun ekzistas, nepre devas daŭri? Ĉu estis konservenda en Francio la monarkia reĝimo, en Centrafriko imperiestro Bokasa ?

* **Danĝero kontraŭ la monda paco.**

Vi estas prava : Liĥtenŝtejno, Andoro, Monako, San-Marino ne endanĝerigas la pacon. Ne samon ni povus diri pri la gran-

daj regnoj kaj aliancoj.

Sed estas regionaj armitaj konfliktoj inter malgrandaj regnoj en Latinameriko, en Afriko, en Azio, en Mezoriento, kiel estis iam en Balkanoj. Sed ne estas plu milito inter la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko, aŭ inter la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo. Esperinde, same ne estos plu militoj en Eŭropo, kiam la eŭropaj ŝtatoj estos vere unuiĝintaj.

Tiam la pacon ja endanĝerigos la ekzisto de grandaj super-nacioj : Usono, Sovetio, Eŭropo, Brazilo, Ĉinio... Ne eblos sekura paco tiel longe, kiel ekzistos suverenaj nacioj aŭ super-nacioj - ĝis ekzistos nur unu sennacia Tero. Utopio ? Jes, certe, sed per utopioj oni preparas la estontan realon. Ĝi estis la utopio de Zamenhof antaŭ ol esti tiu de Lanti, de la mond-civitanoj, de la sennaciistoj.

* Racio kaj kredo

Racion posedas kaj uzas ankaŭ la dikredantoj. Jes, ili uzas ĝin - ekster religiaj demandoj. Ili rezervas apartan bienon, en kiun al racio estas malpermesate eniri. "Credo quia absurdum" estas tre logika moto : tio ne estas racie pravigebla, do mi kredas ĝin. La racionalistoj male diras : tio ne estas racie pravigebla, do mi ne kredas ĝin. Mi ĝin agnoskos, se ĝin pravigos iam nerefutebla racia argumento.

Kiel la dikredantoj posedas racion, tiel ankaŭ ni posedas sentkapablon ; sed ni ne "sentas" la supernaturon. Se tiaj kreis nin via Kreinto, pri tiu manko ni ne kulpas.

* La Biblio ne estas racia.

Tion vi almenaŭ ne neas. Vi prave komparas ĝin kun kino-filmoj aŭ romanoj. Mi vidas ĝin kiel amason da belaj fikcioj bazitaj jen sur historiaj faktoj, jen sur popolaj legendoj, jen sur puraj imagoj de poetoj nomitaj profetoj. Ĝi estas neelĉerpita fonto de inspiro, el kiu ĉerpis Racine, Hugo, Vigny, se nomi nur francajn poetojn. Ni ne estas tiel obtuze senkulturaj, ke ni tion ignorus. Ni nur rifuzas rigardi tiujn fikciojn kiel nekon-testeblajn verojn.

* Influo de la medio.

Mia patro, naskita kaj edukita en kredanta protestanta familio, memstare liberiĝis el la media influo. Li tamen kredis pri iu ebla "Superega Estulo". Inter tiu patro kaj katolika patrino, mi kreskis al senkredeco. Sed mi konas multajn, kiuj apartenas al la katolika aŭ al la protestanta religio nur tial, ke ili naskiĝis kaj vivis en tia familia medio, kaj neniam provis memstare pripensi la demandon.

* La celoj de sennaciismo

Interalie "uzado de Esperanto kiel sola kulturlingvo". Vi diras : "Sennaciismo celas la morton de ĉiuj homaj kulturoj minus unu". Demando : ĉu mortis la antikvaj greka kaj latina kulturoj, tial ke nur malmultaj homoj kapablas legi Homeron kaj Vergilion en la originalaj tekstoj ? Kaj kiom da kristanoj legas la Biblion en la originalo ? Ĉu tiuj kulturoj, iam esprim-itaj en naciaj nun mortintaj lingvoj, ne estas savitaj tra moderna tradukoj ?

Kial do ne havi por ĉiuj kulturoj unu solan kulturlingvon, la internacian ? Tiun ĉi opinion ne inventis mi, nek Lanti : ĝi estis tiu de Zamenhof (relegu en la Fundamenta Krestomatio: "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia". Mi ne elvokas la aŭtoritaton de la Majstro : nur legu liajn argumentojn, primeditu ilin, kaj faru al vi memstaran opinion.

P.S. Mi plene konsentas kun BGD el Eymet (L! 69, "Precizigoj pri Alternativo"), kiam li diras : "En la komenco de Esperanto la koncepto pri sennaciismo kaj sendogmismo estas nete implicataj en la koncepto pri unulingvismo (Lanti nur postpaŝis la vojon signitan de Zamenhof)".

VALO

IU PLIA ARTIKOLO PRI SUPERSIGNOJ...

Mi legis interesan artikolon de Shao Shukang en L!. Lia solvo estas logika kaj li prezentas la fundamentan problemon. Sed tio donus teruran aspekton al la lingvo, ĉefe por okcidentaj komencantoj, escepte de skrablo-ludantoj.

Mi praktike spertis la problemon, uzante minitelon la unuan fojon : Kiel tajpi "ŝ" ? Mi serĉis sur la klavaro taŭgan signon, mi trovis "ˆ", sed ĝi funkcias nur kun vokaloj. Mi skribis "s' ", kaj konstatis, ke la vorto estis tute legebla.

Poste, mi rimarkis, ke iuj uzis **h** anstataŭe. Sed la tralegado estas pli malrapida, ĉar la okulo rekonas la TUTAN vorton, kiu ne havas sian kutiman aspekton, tiukaze. Cetere, se la vortoj estus tiel legeblaj, sufiĉus, por ĉiam, uzi "**h**", kaj ne plu estus problemo !

Mi pripensis la aferon, kaj rimarkis :

- 1) ke tiu solvo ne ŝanĝas la statuton de la ĉapelitaj literoj.
- 2) ke " ' " estas jam uzata por anstataŭigi "a" aŭ "o" en E, kaj aliajn literojn en aliaj lingvoj, do kial ne "**h**" ?
- 3) ke " ' " estas uzata ankaŭ por transskribi araban literon, kiel en "shi'ite"
- 4) ke la "**h**" solvo ne plene taŭgas, ne nur pro la malplia leg-

- ebleco de la vortoj, sed ankaŭ ĉar la konfuzo de "u" kaj "ŭ" tute maltaŭgas en iuj situacioj, kiel komputera E-vortaro.
- 5) ke la aspekto de la lingvo ne estas multe ŝanĝita, sed ankaŭ iĝas juna, moderna kaj alloga.
 - 6) ke, se oni metas " ' " tuj post "z" en la alfabeto ordo de la vortoj ne ŝanĝiĝas.

Tiu solvo ŝajnas al mi solvi samtempe ĉiujn problemojn.

Mi petas do al Akademio de Esperanto kaj al komputeraj organizoj, ke, okaze de la centjara jubileo, ili simbole decidu adopti tian regulon, kiu, por ĉiam haltigos la ĉapelajn/kapelajn debatojn en nia movado.

Se, male, la sola solvo proponita restas elturniĝi kaj debati pri reformoj, Esperantistoj estos ridindaj, kiam ili ne kapablos komunikigi siajn komputerojn pro malsameco de la sistemo. (- Vidu, oni povas komuniki tutmonde esperante per komputila reto! - Sed kio okazas ? - Heee, mi estas iom konfuza, lia kodo por ĉ estas tiu, kiu, en mia komputero, forviŝas la ekranon!).

RESUME, mi proponas jenon :

- 1°) Uzado de " ^ " ĉiam, kiam eblas. Tio devas resti la fundamenta oficiala formo.
 - 2°) Uzado de " ' " en la aliaj kazoj, aŭ kiam oni komunikas per reto, en kiu iuj uzantoj ne havas eblecon ĉapeligi la literojn.
- LAU' MI, TIAJ C'APELAJ'OJ
NE MULTE S'ANG'OS LA LINGVON !

J'ANSEB...

KIA MALRACIA SOLVO !

Rebato al propono de P.M.G. en Laŭte! n°69

La uzado de **q, w, x, y** estas tro komplika afero. Aliflanke la supersignoj mem partoprenas al la beleco kaj internacieco de nia lingvo, eĉ al ĝia spirito kaj sprito. Ekzemple la vorto "ĝardeno" skribe aspektas kiel la germana "garden" kaj samtempe sonas kiel preskaŭ la franca aŭ la itala. Kia mirindaĵo, niaj supersignoj, ni ne forpeli ilin! Alia demando, ĉu P.M.G. konscias pri la ŝanĝo de la vicoj de la vortoj laŭ la alfabeto, aŭ ĉu P.M.G. celas la detruon de la jam ekzistantaj vortaroj, do de la lingvo mem ?

Jen praktikaj kontentigaj solvoj :

* aŭ vi ne havas la eblecon uzi supersignojn, kaj la teksto povas esti legata de ne-Esperantistoj (telegramo, adreso sur leterkovertito... ktp). Uzu la Zamenhofan solvon de aldono de **H**. La alfabeto sinsekvo iomete ŝanĝiĝas, sed almenaŭ la vortoj

ŝajnas legeblaj al ĉiu, ekzemple, eĉ ne-Esperantisto legos "shafo" eĉ pli facile ol la vorton skribitan "ŝafo". Sed ne forgesu la riskon de konfuzo, ĉar la litero "h" jam ekzistas en E! * aŭ vi laboras en esp-ista medio kaj ne havas taŭgan ilon. Ne hezitu, kaj aldonu ĉiam la literon "x". Tiamaniere vi ne "sxangxos" la alfabetan sinsekvon de la vortoj, kaj eĉ se la vortoj "Lauxte" aŭ "aux" povus aspekti iom strangaj ĉe l'unua vido... Krome, estas relative simple reaperigi automate la bonan skribmanieron, ekzemple per simpla komputila programeto, eĉ se la "printilo" ne havas supersignajn literojn. Tiukaze uzu la interliniojn !

LORENT

ĈAPELOJ

(Vd. en L! 69 la artikolon de Shao Shukang)

Plurfoje mi defendis tiujn malfeliĉajn ĉapelojn. Tamen ni ne estu tro obstine konservistaj. Mi konfesas, ke ne ĉiuj kontraŭaj argumentoj estas tute malpravaj. Mi konsentas kun Shao Shukang, ke ŝanĝo en la alfabeto ne fundamente ŝanĝus la lingvon (ĝi tamen estus ŝanĝo en la Fundamento, ĉar la alfabeto estas parto el ĝi). Tial ni kiel esperantistoj ne rajtas arbitre decidi pri tia ŝanĝo ; sed ni povas pripensi la demandon, kaj serĉi eblajn solvojn.

La ĉefa malfacilo venas de tio, ke ni havas ses ĉapelitajn literojn, dum la latin-angla alfabeto povas liveri nur 4 : q, w, x, y : do ne eblas starigi ekzaktan interrespondon inter tiuj du aroj de literoj.

Kelkaj rimarkoj :

1. **h** estas malofta. Estas plikajplia tendenco anstataŭigi ĝin per **h**, **k** aŭ **ĉ**. Jam la zamenhofa "ĥino" arkaikiĝis, kaj per universala silenta interkonsento estas anstataŭigita per "ĉino".

Kelkaj apartaj problemoj : ĥoro (horo, koro), ĥolero (kolero), ĥoralo (koralo), estas solveblaj. Jam en PIV ni trovas ĥoro = koruso, ĥolero = kolerao. Do la litero **h** estas tute forigebla.

2. Kelkaj literoj reprezentas ne simplajn, sed kompleksajn sonojn ; sen ŝanĝi la esperantan alfabeton, ili estus anstataŭigeblaj : **ĉ** per **ts**, **ĝ** per **dj** (kaj **c** per **ts**, sed ni vidos, ke ni ne bezonas ŝanĝi tiun ĉi). Komparu niajn **ks** kaj **kz**.
3. Miaopinie, ido estas malpli bona ol esperanto. Sed ne ĉio en ĝi estas malbona. Ni povas adopti el ĝia alfabeto : **y** anstataŭ **j** (yes, japana, kelkaj) **j** anstataŭ **ĵ** (jurnalo, jeti) Eble tial, ke mi estas franclingvano kiel Couturat, tiu solvo plaĉas al mi pli ol tiu, kiun proponis Shao Shukang (**y** anst. **ĵ**).

Liaj aliaj proponoj ŝajnas al mi akcepteblaj.

Konklude : Ni povus adopti ĉ → q, ĝ → dj (cetere ofte anstataŭigebla per simpla j), ĥ → h aŭ k, ŝ → x, ŭ → w.

Tiel ni ricevus sufiĉe koheran alfabeton skribeblan per la klavaro de la anglalingvaj skribmaŝinoj, preseblan per la materialo de la anglalingvaj presejoj.

Sed mi ripetas, tio estus ŝanĝo en la Fundamento. Ne nur en ĝia Alfabeto, sed ankaŭ en la aliaj partoj (Gramatiko, Ekzercaro, Vortaro), kiuj estas skribitaj per la ĝisnuna alfabeto. Tian ŝanĝon povus fari nur iu per universala interkonsento rajtigita instanco. Gravega problemo ne nur por la malmulta legantaro de **L!**, sed por la tuta esperantistaro.

VALO

LA MORTO DE ESPERANTO

Antaŭvideblas, ke Esperanto en ĉi tiu jaro mortos.

Por bone kompreni la signifon de la antaŭvido oni trankvile daŭrigu serioze legi la klarigon. La vorto **esperanto** estas homonimo. Origine **esperanto** estas iu, kiu esperas. Due ĝi fariĝis la nomo de la Zamenhofa lingvo (zali').

En ĉi tiu somero Esperanto fariĝos centjara. Konvena aĝo por malaperi kiel homonimulo. La kelkaj veraj zalianoj ne ploros pro la morto de la homonimulo, kiu pro la enkonduko de multaj fremdaj vortoj ne plu estas la originala zalio. Ankaŭ la traduksistemo fuŝis la facilecon de zalio. Krom tio kelkiuj volas adapti la alfabeton al la netaŭĝeco de skribmaŝinoj kaj aliaj aparatoj, anstataŭ ke en Ĉinio (aŭ Japanio) oni produkti simplajn novajn aparatojn, kiuj taŭgas por zalio. Certe ĉiu vera zaliano tuj aĉetos tian skribmaŝinon.

En la pasintaj cent jaroj la homonimulo ne efektivigis la esperon de Zamenhof. Multaj homonimulanoj opinias, ke unu jarcento ne sufiĉas por krei harmonion inter ili. En Varsovio kongresos la universalaj ; en Bulonjo ĉe maro la ĉefdiablaj kaj en Graz profesoraj kaj doktoraj elitoj konferencos. Intertempe multaj homoj malsatmortadas, kaj diversloke sur la planedo TERO okazas militoj kaj murdoj. Pro honto la homonimulo mortos. En Graz oni inauguros monumenton eble apud la maŭzoleo, en kiu estos la cindro de la homonimulo.

En Bulonjo ĉe maro la ĉefdiabloj hejtos la inferan fajron, por ke la religiaj dogmuloj kaj la ne-religiaj dogmuloj reciproke povu ĵeti unu la alian en ĝin post fajra diskuto pri religio en sennacia asocio. Kio okazos en Varsovio estas ne-antaŭvidebla, verŝajne ili nur festas kaj ne rimarkis la morton de la homonimulo.

Eble post kelkaj jarcentoj (kondiĉe, ke ne okazos nuklea mondmilito) iea iu hazarde trovos ekzempleron de la unua lernolibro, sekve tiu onio povos rekomenci la disvastigon de zalio, dum neniu plu scias la nomon de la nuna homonimulo.

19861215 (4K23) DIK.

AL VERE SUFERANTO KIEL LEPRULO

Urbaitis* kara
mi planis veni al Brazilio
por oferti mian kuraĝan manon !
Sed kial voli leprulon
en kontinento fora
se mi leprulon trovis
en la Parizo apuda ?
Mi honorigas Makson
nomante lin leprulo,
ĉar amegas mi la suferulojn,
kaj leprule suferis la karulo.

*

Ho Maks, leprulo mia,
kiom forte vin amis mi !
Kiom fiere mi nomiĝas
Sinjorino Trenner,
anstataŭ Lina Gabrielli !
Kial mi nomas vin "leprulo" ?
Ĉar terura estis via sufero !
Kial mi akcentas la adjektivon "mia" ?
Ĉar vi estis edzo en la plej sakra senco !
Mi amis vin, heroo mia,
kiu penegis kuraĝe, sen lamento !

Lina Trenner Gabrielli

* Urbaitis : temas pri pastro Petro Urbaitis el Vilnius, kiu zorgis leprulojn en Ĉinujo. Poste li estis en Frascati, en proksimeco de Roma, dum kelka tempo. De tie li iris al Brazilio, S. Paŭlo, por helpi la leprulojn kaj la samlandanojn. Li petis al Lina Gabrielli, antaŭ kelkaj jaroj, iri al S. Paŭlo por skribi kune libron pri Brazilio. Lina intencis iri al samideano Urbaitis, sed en Parizo ŝi konis Maksimilien Trenner kaj ŝi volis helpi al li. Maksimilien Trenner estis heroo en la suferado, neniam li lamentis, li estis homeca en la plej vasta kaj profunda senco. Li ne nur estis helpato, sed ankaŭ helpanto.

SINJORINO HOLLE

Vidvino havis du filinojn. El tiuj unu estis bela kaj diligenta kaj la alia malbela kaj maldiligenta. Sed la vidvino multe pli amis la malbelan, ĉar tiu estis la filino propra. La alia devis prizorgi ĉiujn laborojn kvazaŭ domservistino. La kompatinda knabino ĉiutage devis sidigi sin sur la larĝan straton apud puto kaj ŝpini tiom, ke saltis la sango el la fingroj. Jen iam okazis, ke la bobeno estis tute sanga. La knabino kliniĝis en la puton por lavi la bobenon, sed ĝi falis elmane malsupren. La knabino ploris, kuris al la duonpatrino kaj rakontis al ŝi la malfeliĉon. Sed tiu riproĉis ŝin tiel kolere kaj estis tiel senkompata, ke ŝi diris : "Se vi lasis fali la bobenon malsupren, tiukaze ankaŭ reportu ĝin de malsupre." La knabino do reiris al la puto kaj ne sciis kion fari. Timegante, ŝi saltis en la puton por reporti la bobenon. Ŝi svenis. Kaj, vekiginte, ŝi troviĝis sur bela herbejo, kie brilis la suno kaj staris miloj da floroj. Sur tia herbejo ŝi plu iris kaj venis al bakforno, kiu estis plena de panoj. Kaj la panoj vokis : "Aĥ, eltiru nin, eltiru nin, ĉar ni forbrulos alikaze ! Ni jam delonge estas elbakitaj." La knabino do proksimen iris kaj tiris per panŝovelilo ĉiujn, unu post la alia, elen. Poste ŝi iris plu kaj venis al arbo, plena de pomoj, vokantaj al ŝi : "Aĥ, skuu nin, skuu nin. Ni pomoj senescepte estas maturaj." Jen ŝi skuis la arbon, ke la pomoj falis kvazaŭ pluvo, skuis ĝis neniu plu troviĝis supre. Kunmetinte ĉiujn al stako, ŝi denove iris plu. Fine ŝi venis al dometo, el kiu rigardis maljunulino. Ĉar tiu havis dentojn tre grandajn, ŝi ektimis kaj deziris fuĝi. Sed la maljunulino postvokis ŝin : "Kial vi timas, kara infano ? Restu ĉi tie. Se vi laŭorde plenumos ĉiujn laborojn endome, vi havos bonan vivon. Vi nur devas atenti, ke vi bonordigu mian liton, ke vi skuu ĝin diligente, por ke la lanugoj flugu, ĉar tiam neĝos en la mondo. Mi estas sinjorino Holle." Ĉar la maljunulino tiel bone parolis al ŝi, la knabino ekkuraĝis, konsentis kaj komencis sian servon. Ŝi prizorgis ĉion kontentige al la maljunulino, ĉiam skuis tiom ŝian liton, ke la lanugoj kirle flugis kiel neĝeroj. Por tio ŝi ankaŭ havis bonan vivon. Neniu malica vorto kaj ĉiutage rostaĵoj kaj bolaĵoj. Jam ŝi estis sufiĉe longe ĉe sinjorino Holle, kiam ŝi subite malĝojiĝis, mem ne sciante, kio mankas al ŝi. Fine ŝi konsciiĝis, ke estis la hejmsopiro. Kvan-kam ĉi tie vivante miloble pli bone ol hejme, ŝi sentis spite tion sopiron al hejmo. Finfine ŝi diris al sinjorino Holle : "Mi

sopiras hejmen. Kaj se mi ankaŭ vivas bonege ĉi tie, mi tamen ne povas resti pli longe. Mi devas reiri supren al la miaj." Sinjorino Holle diris : "Plaĉas al mi, ke vi hejmsopiras. Ĉar vi tiel fidele servis al mi, mi mem akompanos supren vin." Ŝi poste ekkaptis la knabinon mane kaj kondukis ŝin antaŭ grandan pordegon. La pordego malfermiĝis. Kaj kiam la knabino staris ĝuste sub ĝi, falis forta oropluvo. La tuta oro alkroĉiĝis al la knabino, ke ŝi estis abunde kovrata. "Tion vi ricevas, ĉar vi estis tiom diligenta", sinjorino Holle parolis kaj redonis ankaŭ la bobenon falintan en la puton. Poste la pordo fermiĝis kaj la knabino troviĝis supre en la mondo, ne malproksime de sia patrina domo. Kiam ŝi venis en la korton, la koko sidis sur la puto kaj vokis :

"Kikeriki,

nia ora virgulino re-estas tie ĉi."

Tiumomente ŝi eniris al sia patrino. Alveninte tiel orkovrite, ŝi estis bone akceptata de patrino kaj fratino. La knabino rakontis pri tio, kio okazis. Aŭskultinte kiel la knabino sukcesis pri la granda riĉo, la patrino deziris havigi al la alia filino malbela kaj maldiligenta la saman feliĉon. Tiu devis sidigi sin apud la puto kaj ŝpini. Ŝi pikis en siajn fingrojn kaj puŝis manon en la dornheĝon, por ke la bobeno sangomakuliĝu. Poste ŝi ĵetis la bobenon en la puton kaj ensaltis mem. Kiel la alia ŝi venis sur la belan herbejon kaj plu iris sampade. Kiam ŝi atingis la bakfornon, la panoj kriis denove : "Aĥ, eltiru nin, eltiru nin, ĉar ni forbrulos alikaze. Ni jam delonge estas elbakitaj." Sed la maldiligentulino respondis : "Ĉu mi frenezas? Ĉu mi malpurigu min ?" Kaj ŝi foriris. Baldaŭ ŝi venis al la pomujo, kiu vokis : "Aĥ, skuu min, skuu min. Miaj pomoj senescepte estas maturaj." Sed ŝi respondis : "Kiajn strangajn ideojn vi havas. Povus ja fali unu sur mian kapon." Plu ŝi iris. Alvenante antaŭ la domo de sinjorino Holle, jam aŭdinte pri la grandaj dentoj de sinjorino Holle, ŝi ne timis kaj tuj dungigis.

Je la unua tago ŝi kvazaŭ perfortis sin, estis diligenta kaj obeis al sinjorino Holle, se tiu diris ion al ŝi, ĉar ŝi pensis pri la amaso da oro, kiun sinjorino Holle donacus al ŝi. Sed duatage ŝi jam komencis maldiligenti. Kaj la trian eĉ pli. En tiu tago ŝi eĉ ne volis ellitiĝi. Ŝi ankaŭ ne bonordigis la liton de sinjorino Holle, ne skuis ĝin, por ke la lanugoj flugu. Pri tio sinjorino Holle baldaŭ tiom ĉagreniĝis, ke ŝi maldungis ŝin. Sed la maldiligentulino tre kontentis pri tio kaj opiniis, ke nun la oropluvo venos. Sinjorino Holle kondukis ankaŭ ŝin al la pordego. Sed

kiam la maldiligentulino staris sub ĝi, anstataŭ oro estis elverŝita granda kaldrono plena de peĉo. "Tio estas la rekompenso por viaj servoj", sinjorino Holle diris kaj fermis la pordegon. Tiumomente la maldiligentulino venis hejmen. Sed ŝi estis tute kovrita de peĉo. Vidante ŝin, la koko sur la puto kriis :

"Kikeriki,
nia malpura virgulino reestas tie ĉi."

Sed la peĉo firme alkroĉiĝis al ŝi kaj ne volis deiĝi dum ŝia tuta plua vivo.

Trad. Hagen Hirte

Sinjorino Holle, ĉu duba, ĉu perfekta eĉ nun ?

Karaj infanoj, grandaj kaj malgrandaj ! Kutime tradukinto tute silentas, kaj lasas "paroli" sian aŭtoron. Nu, mi rompas tiun leĝon, ĉar mi scivolas pri io tute certa. Kiam mi retradukis la fabelon - ĝi jam delonge kuŝis en tirkesto - falis duboj sur min, ĉu tiu fabelo ankoraŭ povas esti helpo por la nunaj infanoj. Kiam mia avino - la plej bona el la tuta mondo! en mia infaneco prelegis tiun fabelon al mi, mi estis forte impresita. Ja, tute klare mi povis imagi sinjorinon Holle, kiel ŝi skuas la littukojn, por ke neĝu en la mondo kaj mia koro tremis por la filino bona. Kaj mi pensis, ke mi nepre ĉiam estos diligenta homo. Nu, sed nun min mordas duboj. Ĉu tio veras, ke oni ĉiam estu diligenta ? Ĉu veras, ke la diligentuloj ricevas sian rekompenson en oro ? Ĉu la brila kaj loganta oro estas la ĝusta rekompenco ? Nu, mi ne volas tro influvi viajn opiniojn. Tamen, tre interesus min, kiel vi pensas pri tiu fabelo, pri la valoro de fabeloj ĝenerale. Skribu al Laŭte, por ke ni ĉiuj povu ekscii viajn ideojn, vidpunktojn ktp... Se vi ankoraŭ ne sufiĉe bone regas la verdan lingvon, skribu en via lingvo kaj petu la gepatrojn, ke ili traduku por vi.

Salutas vin ĉiujn via Hagen Hirte.

MONDSOCIALISMO (fino)

grupoj proponas aliajn solvojn al nia stulta socio : Verduloj, Pacistoj, Liberecanoj ktp., sed ili ne estas komprenataj de la amaso de la balotantoj. En Francio ili kolektas nur 2 aŭ 3 % el la voĉdonoj, en Fed. Germanio iom pli. Kion fari, por ke tiu malplimulto fariĝu plimulto ? Estus necese ŝanĝi la mensojn! Ĉu vera socialismo estas ebla ekstere de malgrandaj grupoj ?

(Espereble, aliaj vidpunktoj aperos en la venonta L!)

La jubilea Kongreso de Esperanto en Nederlando

Vizitu la Nederlandan jubilean Kongreson en 1987 !

En la semajnfino de la 3a, 4a kaj 5a de aprilo 1987 okazos en la kongresejo "Hotelo Amersfoort" Stichtse Rotonde 11 en Amersfoort, la komuna Esperanto-Kongreso, festa jubilea kongreso okaze de la 100-jara datreveno de la lingvo Esperanto.

Ĉiuj el vi, kiuj vizitis la SAT-Kongreson en 1985 jam konas la kongresejon. El la provizora plano por la programo mi povas citi :

Kultura vespero kun la Pola aktoro Jery Fovual kaj la magiisto "Trixin!" el Germanio. Manifestacio ĉe la urba biblioteko, malfermo de E-eksponcio en la biblioteko ; invititaj prelegantoj estas Zofia Banet-Fornalova el Pollando kaj William Auld el Anglio. Esperanta Kantato de la Nederlanda komponisto Friso Moolenaar.

Kotizoprezoj (ĝis 31/1/87) sola plenkreskulo F 175.-- ; geedza paro F 320.--
Junulo (ĝis 25a jaraĝo) F 85.--

Petu aliĝilojn ĉe la kasistino C. Bossong-Singer, Floraplein 23, NL 5644 JS Eindhoven. La poŝtĝirkonto-numero de la kongreso estas nro 4 382 355 nome de "Nederlanda Esperanto-Kongreso", Eindhoven, Nederlando.

La sekretario, A. Noordewier-Jagtenberg.



MONDHEJMO

Ekologia Centro Internacia
kun Esperanto kiel oficiala lingvo

RAPORTO PRI NIA JARFINA KUNVENO
en Hamburgo, dum la 27a kaj 28a de dec.1986

Ni estis 7 aktivaj partoprenantoj venintaj el Belgio (1), Francio (1), FR-Germanio (3) kaj Kanado (2), kiuj post interkonatiĝa vespero kunsidis la 27-an kaj 28-an de decembro du plenajn tagojn.

Diversaj proponoj por plibonigi nian presitan informilon de pasinta aprilo movis nin modifi kelkajn alineojn en ties teksto kaj prepari novan version, kiun ni ellaboros kaj presigos en la venontaj semajnoj.

Koncerne nian sidejon, ni decidis starigi ĝin en Cauduro, preskaŭ forlasita vilaĝo en sudorienta Francio, 40 km. for de Béziers, inter la urbetoj Saint-Chinian kaj Saint-Pons. Por kontribui al la aĉeto de tereno aŭ/kaj domoj tie ni ricevis ĝis nun 2 proponojn de pruntedono pri 3000 FF kaj 1 pri 15000 FF.

Por la elekto de nova estraro por 1987 prezentis sin nur 3 kandidatoj,

tiel ke la manko de kontraŭkandidatoj por la 3 postenoj faris baloton nenecesa
La nova estraro konsistas el jenaj membroj :
Nicole PAIROUX, prezidantino ; Akiles SANZ, sekretario, Catherine SAMAIN,
kasistino.

La nombro de niaj membroj plialtiĝis intertempe ĝis 39 : 5 el Belgio, 16
el Francio, 13 el FR-Germanio, 4 el Hispanio kaj 1 el Kanado. Plenaj membroj
estas 28, kaj apogantaj membroj 11. Aldone estas 3 donacintoj kun kontribuoj
inter 20 FF kaj 500 FF. Konservigas en nia membraro la ekvilibro inter viraj
kaj virinaj membroj : 20 kaj 19 respektive.

Kiel donacon por presigi nian novan informilon ni ricevis 600 FF de Ham-
burga MH-anino. Informas :

- en Belgio : Nicole PAIROUX, Rue Saint-Luc 35, 5004 Namur
- en Francio : Catherine SAMAIN, 9 avenue de Verdun, 60200 Compiègne
- en FR-Germanio : Akiles SANZ, Hafensplatz 6, 1000 Berlin 61

NIKARAGVO : Interesatoj pri la alvoko de Jean-Louis HUSSE
(vd. L! 69 p.23/27) bonvolu noti lian adreson : J.L. HUSSE,
Hôtel de l'Aviation, Av. du Colonel Rozanoff, F 40000 MONT DE MARSAN.

Tri bahaanoj murditaj en Irano :

- Bijan Talebi, 16-jara, murdita per strangolado kamuflita kiel memmortigo.
- Proksime de Teherano, Irani Mehdi Nezhad, 59-jara, murdita per 16 ponard-
frapoj.
- Habibullah Mohtadi, 70-jara, estis enkarcerigita kvin jarojn kaj liaj posed-
aĵoj estis konfiskitaj. Petinte siajn posedaĵojn post sia liberiĝo, li estis pafmort-
igita la 27an de aŭgusto.

Laŭ dokumento de Bahaa Asocio en Hispanio.

Interesiĝas pri uzitaj poŝtmarkoj el la tuta mondo :
Jesus PEREZ, Apdo 280, E-11300 LA LINEA (Cadiz)

* Kreiĝis la : GRUPO POR LA KONSCIENCOBJETANTOJ,
Joventut Catalana d'Esperanto, Apartat de Correus 290,
E-08200 SABADELL, Hispanio.

MONDONACOJ POR AĈETO DE NIA OFSETILO "Aŭgusto"

Iom post iom ŝtopiĝas la breĉo. **Tria listo de donacintoj**, kiujn
ni ĉiuj varme dankas : K.H.K. 50 - G.R. 20 - R.D. 70 -
E.D. 100 - G.L. 100 - N.M. 100. Sume, kun la unuaj listoj :
3621 FF.

Plu daŭras la kolektado...

Plu daŭras la kolektado...

Plu daŭras la kolektado...

KOMUNA DEKLARO

el asocioj, movadoj, partioj kaj revuoj en ĉiuj landoj
koncerne la TUJAN INFORMON de la LOĜANTAROJ
okaze de nukleaj akcidentoj aŭ de situacioj kun radio-
logia urĝeco, kaj la TUJAN DISKONIGON de instrukcioj
pri protekto kaj kuracado por LOĜANTAROJ.

La subskribintaj asocioj, movadoj, partioj kaj revuoj en ĉiuj landoj kons-
cias la gravecon de la efikoj imputeblaj al la katastrofo de ĈERNOBILO.

La amaskomunikiloj sciigis nin, ke en la 26a de septembro de 1986, la
reprezentantoj de 51 ŜTATOJ el la 94 ĉeestantaj (113 ŜTATOJ estas enregis-
tritaj), anoj de la Internacia Agentejo pri Energio Atomo (IAEA), kunvenintaj
en Vieno, adoptis du konvenciojn kaj finan rezolucion.

La unua konvencio devigas ĉiun subskribintan ŜTATON averti "senpro-
kraste" la proksimajn ŜTATOJN, kiuj povus esti fizike trafitaj de radioaktivaj
forĵetoj. La dua konvencio koncernas la reciprokan helpon inter subskribintaj
ŜTATOJ okaze de nukleaj akcidentoj aŭ de situacioj kun radiologia urĝeco.
La fina rezolucio reasertas la prirespondecon de ĉiu ŜTATO ekligiĝinta en
nukleaj aktivadoj.

Rezultas el tiuj du konvencioj kaj el tiu rezolucio, ke solaj la ŜTATOJ
estas koncernataj, se subite okazos aliaj nukleaj akcidentoj aŭ situacioj kun
radiologia urĝeco, eventuale translandlimaj. Nenie estas menciitaj devigoj de
ŜTATOJ al la LOĜANTAROJ, tiom pri la informo ŝuldata al ili, kiom pri la
planaĵoj pri protekto kaj kuracado, kiujn ili devus TUJ profiti.

Konsekvence ni petas niajn respektivajn registarojn sin devontigi TUJE
publikigi tage kiel nokte, per radio, televido kaj ĉiuj gazetaragentejoj ĉiujn
utilajn informojn koncerne la nukleajn akcidentojn kaj la situaciojn kun radio-
logia urĝeco celitajn de la unua konvencio EN LA SAMA TEMPO KIAM ESTOS
AVERTITAJ LA PROKSIMAJ LANDOJ KAJ I.A.E.A.

Krome ni petas niajn respektivajn registarojn, ke instrukcioj pri protekto
kaj kuracado por LOĜANTAROJ estu TUJE redaktataj kaj diskonigataj, kaj
rememorigataj okaze de nukleaj akcidentoj aŭ de situacioj kun radiologia
urĝeco tuj post la unuaj informoj diskonigitaj per radio, televido kaj ĉiuj
gazaragentejoj SEN ATENDI, KE ESTOS APLIKITAJ LA DECIDOJ ANTAŬVID-
ITAJ DE LA DUA KONVENCIO.

Fine ni petas niajn respektivajn registarojn respondi al nia komuna deklaro.

En la 22a de decembro 1986, aprobis la diritan KOMUNAN DEKLARON :
la Amikoj de la Tero, grupo de Val d'Ysieux (F - Fosses) ; la Asocio Brion-
Garonne (F - Langon) ; la Asocio por Protekto de Mozvalo (F - Cattenom);
la Asocio por Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj (APJR*) (F - Crisenoy);
la Asocio por Studado, Protekto kaj Aranĝo de naturo en Sudokcidento (F -
Bordeaux); Belforta Asocio por Protekto de Naturo (F - Belfort); Briarda
Ekologia Movado (F - Coulommiers); Ekologio kaj Evangelio (F - Châteauroux);

Ekoropo (F - Paris) ; Federisma Eŭropa Partio (F - Paris) ; Franca Federacio de Asocioj por Protekto de Naturo (F - Paris) ; Francilia Ekologia Movado (F - Coulommiers) ; Gazetarservo por Informo pri Naturo kaj Ekologio (F - Coulommiers) ; Impeto, revuo (F - Linselles) ; la Komitato por Protekto de Fessenheim kaj de Rejnebenaĵo (F - Fréconrupt) ; Movado por Distribua Aŭtoadministrado (F - Lésigny) ; Movado por Neperforta Alternativo (F - Montargis) ; Nordnaturo (F - Lille) ; Sejno kaj Marno Ekologio (F - Saint-Augustin) ; Unuiĝo de Amikoj kaj Protektantoj de Naturo (F - Coulommiers).

La subskribintoj de tiu DEKLARO deziras ĝian aprobon far aliaj grupoj kaj revuoj en ĉiuj landoj, kaj egale far PERSONOJ unuopaj.

* De APJR vi povas legi la esperantlingvan broŝuron ALVOKOJ AL LA HOMA KONSCIENCO : 1) Tute antinukleaj ; 2) Kodo de scienca deontologio ; 3) Alvoko al la homoj ; 4) Reguloj de deontologio pri laboro ; 5) Individuaj liberoj ; 6) Kodo de komunika deontologio. Mendebla al : Cercle amical esp. agenais, F - 47340 Laroque (6 FF + sendkostoj al pĉk 3371 74 M Bordeaux).

Ndlr. : Personoj, grupoj aŭ revuoj, dezirantaj sendi sian aprobon al tiu KOMUNA DEKLARO, bonvolu sin turni al : APJR, J. Pinjero, 80 rue des Noyers, Crisenoy, F - 77390 VERNEUIL L' ETANG.

Pascal DUBOURG :

INTERVJUO kun ITACIR LUCHTEMBERG vicprezidanto de Parana Esperanto-Asocio, direktoro de BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Ĉi-somere, vizitis la Kulturan Centron en La Chaux de Fonds Itacir LUCHTEMBERG, brazila ĵurnalisto, vidprezidanto de E-asocio en la ŝtato Parana (urbo Maringá), direktoro de Brazila E-Ligo. Li revenis el la U.K. en Pekino, kie li anstataŭis komitatanon. Mi ĝuis la okazon por intervui lin pri la esp-movado en Sudameriko.

- *La eŭropaj esperantistoj pensas, ke la movado fartas ege bone en tria-mondaj landoj aŭ en ekstria-mondaj landoj, kaj ŝajnas pravaj. Fakte kiom da esp-istoj estas en via lando ?*

- Kiel en ĉiuj landoj oni ne povas nombri precize la esperantistojn. Tamen eksa direktoro de Brazila E-Ligo faris enketon kaj sukcesis nombri sesmil adresojn de esp-istoj, kiuj parolas la lingvon. Sed kompreneble estas pliaj, kiuj lernis la lingvon sen aliĝi la movadon.

- *Ĉu via asocio estas landa sekcio de UEA ?*

- Jes, B.E.L. estas nuntempe la sola organizaĵo en Brazilo, ĉar antaŭe estis tri landaj asocioj, kiuj volis reprezenti la movadon brazilan ĉe UEA. Sed pasintan jaron la movado unuiĝis,

kaj tio estas granda paŝo.

- *Ĉu ekzistas ankaŭ landaj sekcio de SAT aŭ ICNEM en Brazilo ?*

- Jes, fakte estas en nia lando reprezentanto aŭ peranto por ĉiu esperanto-asocio, ke ĝi partoprenu aŭ ne en la UEA-sistemo.

- *Kiel disvastiĝas la poresperanta laboro vialande ?*

- Nu, nuntempe la ĉefa karakterizo de nia movado estas la juneco de la esperantistoj tie, tio signifas ke la junulara E-movado en Brazilo estas tre ege forta.

- *Ĉu vi pensas, ke oficialigo de esperanto pli facile povus okazi en via lando ol en Eŭropo ?*

- Jes, mi kredas, ke jes. Ĉar en Brazilo ni neniam havis problemojn tiurilate kun la parlamentanoj, la ĵurnalistoj. Ĉiam la diversaj sociaj grupoj en Brazilo vidis esperanton kun bonaj okuloj. Oni ne havas tiajn antaŭjuĝojn, kiujn oni kutime havas en Eŭropo. Sed tio dependas ĉefe de la laboro de la esp-istoj. Sed ĉe ni ili ne kontraŭstaras la ideon kaj la lingvon, tio jam estas ja grava. Nun oni povas vere disvastigi la lingvon kaj libere uzi ĝin. Kiam oni ne povas, oni facile trovas la subtenon de la oficialuloj.

- *Kiujn malfacilaĵojn vi renkontas ?*

- La plej grandaj malfacilaĵoj kuŝas en la strukturo mem de nia movado. Oni ne povas fari sufiĉe bonan laboron. Kaj nun ne plu eblas kalkuli nur je la bona volo de ĵurnalistoj kaj parlamentanoj. Ni mem devas havi fortan bazon. Nun ni bezonas spertajn homojn kaj monon, kaj sur tiu bazo fari gravan laboron.

- *Ĉu tiurilate UEA ne helpas vin ?*

- Tute ne ! Mi faris tiun demandon en Pekino. Kiel la nova estraro rilatos kun la landaj sekcioj ? Kaj oni respondis ke fakte estas nuntempe planate ŝanĝi la politikon pri tiuj rilatoj. Ili konscias, ke nun oni ne sufiĉe flegas tiujn rilatojn. Kaj pro tio aperas fortaj antaŭjuĝoj kontraŭ UEA.

- *Sed la movado ŝajnas bone disvastiĝi en via lando, ĉu same okazas en aliaj sudamerikaj landoj ?*

- Pri tio mi ne povas diri. Mi scias nur ke la movado komencas kreski en Argentino kaj Kolombio. Aliloke la movado estas plej malforta.

- *Kiujn esperojn vi havas por la venonta jaro ?*

- Mi pensas, ke se la esperantistoj povos ekspluati la jubilean jaron, ĝi estos tre sukcesa. Sed ankaŭ mi pensas ke en la triamondaj landoj la movado havas grandan estontecon ĉar ni malfacile havas internaciajn kontaktojn. Niaj registaroj ankaŭ deziras utiligi esperanton por disvolvigi la landon kaj tio estas nova sinteno de iu lando rilate al esperanto.

SUGESTOJ...

Inter pluraj interesaj - sed eble ne tre facile realigeblaj - sugestoj pri L! kaj SAT-broŝurservo, laŭtulo demandas : "...Kial vi ne enŝovas almenaŭ sur duona paĝo interesajn alineojn el la broŝuroj ? Tion mi rigardus efika rimedo por interesigi la aĉetontojn. Jen eĉ eblo legi tion kaj ĉi tion, eĉ se oni pro konataj kaŭzoj ne povas aĉeti la kajerojn. Tio povus esti regula parto de la pribroŝura paĝo..."

Proksimume 25 % el la laŭtularo estas samtempe abonantaro de la broŝura serio. Tio certe estas kuraĝiga, sed ve, ne sufiĉa por garantii pluan bonfarton de la broŝurservo, ĉar la eksterabonaj mendoj ĝenerale estas ne multaj, kaj eĉ malmultegaj kiam temas pri filozofiaj, sociologiaj aŭ similaj temoj. Multaj el la malnovaj broŝuroj de SAT-BS estas, almenaŭ miaopinie, ĉiam aktualaj kaj spirite riĉigaj. Eble inter la freŝdate abonintaj laŭtuloj troviĝus interesatoj pri tiuj tekstoj. La sugesto ŝajnas do nepre efektiva. Estus bone ankaŭ, ke legintoj parolu mem pri la broŝuroj en L!, ne kiel kvazaŭ "profesiaj" recenzistoj, sed kiel simplaj legemuloj, ĉar ties opinioj fakte estas por ni tiuj, kiuj plej valoras. Ĉi-foje jen vidpunkto pri iu aspekto de nova eldonaĵo :

La gramatiko de LANTI

Legante la libron de **Le Dantek** "La Konflikto" en la traduko de **Lanti**, gramatikistoj miros kaj estos ŝokitaj pro la ofta forlaso de akuzativo. Tiu forlaso estas intenca (vd. la antaŭparolon). Oni povas rimarki, ke Lanti uzis la akuzativon, ĉiufoje kiam ĝi estis necesa al ĝusta kompreno de la frazo. Ĉie, kie li ne uzis ĝin, la teksto tamen restas klare komprenebla.

Zamenhof iam diris, ke en dubaj okazoj oni povas ne uzi akuzativon, kondiĉe nur ke la senco restu klara. Lanti aplikis tiun konsilon ĝis en ĝia ekstrema konsekvenco. Ĉiam gvidis lin la ora regulo : neceso kaj sufiĉo. Ĉio necesa kaj sufiĉa, por ke la esprimata ideo estu klara, kaj for la balastajn subtilaĵojn! Mi ne ĉiam kuraĝas sekvi lin en lia rigora logiko, sed mi konfesas, ke tiel li konservis al nia lingvo ĝian esencan karakteron : lia esperanto estas ĉiam klara, simpla kaj facila.

La gramatiko de Lanti ne estas tiu de la Plena Analiza Gramatiko (laŭ li tro plena) ; eble ĝi ne estas ekzakte tiu de la Fundamenta gramatiko, sed ĝi iras laŭ la direkto signita de la Iniciatoro.

VALO

* **La Konflikto** (F. Le Dantek) + **Dubi** (Alain), trad. Lanti, 136 paĝoj... 20 FF

bv. aldoni al la listo de L! 69 : LM. **La Mondo ne havas atendejon** 15 FF

forstreki : BG. (nun elĉerpita)

KRUCVORTENIGMO
de **Sfinksido** (C.Cavalié)

Horizontale :

1. - Ŝi batalas por "ripari de la temp' ofendon senriparan" (E.Boirac, laŭ Racine)
2. - Eŭfemismo por nomi landon, kies stato ĝenerale pli kaj pli malboniĝas.
3. - Ĝiaj loĝantoj ne havas problemojn pri lifto (s.f.). - Adverbo.
4. - Persona pronomo. - Ĝi malhelpas la aŭtomobilon iri plenrapide.
5. - Literumante : Mal-longa memoriga enskribo. - Etapo, periodo (s.f.).
6. - Malutila papilio. - Malsimpla prepozicio.
7. - Por helpi iun, kiu ne sukcesis digesti ion (s.f.). - Prepozicio.
8. - Ĝia buŝo ne estas amorveka (s.f.). - Rilata al la ujo en kiun oni metas la pesotaĵon en pesilo.
9. - Konsistaĵo de la sango, dum tiu ĉi estas likva (s.f.). - Prepozicio. - Preno (s.f.).
10. - Rezistanco, kiun la korpoj kontraŭmetas al movo (s.f.).
11. Budhista pastro. - La oka, kiam temas pri bildrakontoj.

Vertikale :

1. - Ĝi tronas sur ĉiuj konstruejoj (s.f.).
2. - Kun multaj kaj gravaj okazaĵoj.
3. - Aŭstralia papago... sen vosto. - Iu ekpensis pri Pitagoro (s.f.).
4. - La tria parto de la maldika intesto (s.f.). - Senkompata, nesimpatia. - Simbolo de malofta metalo uzata kiel kuracilo.
5. - Ĝi sukcesas trabori la monton granitan. - Kiam oni parolas pri tio, la Japanoj diras dankon! (*).
6. - Rilata al laboriloj de iu metiisto. - Persona pronomo.
7. - Ĝi dolorigas la malsaĝulojn kiel la aliajn (s.f.). - La tria tono ĉe la francaj kaj italaj muzikistoj.
8. - Sur veturilo ruliĝanta en Tunizio. - Montherlant (franca verkisto) diris, ke, ĝenerale, li, kaj liaj similuloj naskiĝas en domoj, kie oni ne kuraĝas doni ordonon al la servistino (s.f.).
9. - Ĉiu havas la sian, koncerne la internan. - Lasta parto de eŭropaj manĝoj (s.f.).
10. - V-forma enranĉo en eĝo (s.f.). - Ofte, li klopodas por satigi la kaprinon kaj konservi la brasikon.

Klarigo : (*) Mi ŝuldas tiun difinon al K-do Lanti. Vidu "Laŭte" n° 68 p. 17.

Solvo de la enigmo aperinta en L! 69 :

Hor.: 1. TRAKNIVELA. 2. NEAGEMEC. 3. MIENI. RIMI. 4. ALKOVO. NUD. 5. TED. ESPERO. 6. SKOT. TENO. 7. ASTAK. RT. 8. LO. RADIUMA. 9. ETIMOLOG. 10. TEGAD. DATO. 11. OPERATOROJ.

Ver.: 1. TOMATSALATO. 2. ILEKSO. EP. 3. ANEKDOT. EGE. 4. KENO. TARTAR. 5. NAIVE. KAIDA. 6. IG. OST. DM. 7. VER. PERIODO. 8. EMINENTULAR. 9. LEMURO. MOTO. 10. ACIDO. LAGOJ.

BILANCO de "Laŭte!" por 1986

Nombro da abonoj en 1986 : 408 (400 en 1985). Restas do "loko" por pli da abonoj en la jubilea jaro 1987. Notindas, ke, dank'al ies malavaro, 33 abonoj estis donacitaj al legantoj nepagipovaj. Ilianome, dankon !

Sendis kontribuajojn : 72 malsamaj personoj el 18 landoj (40 loĝas en Francio). En 1985 : 46, el 13 landoj (28 el Francio). Do, ne nur pli da geverkemuloj, sed ankaŭ pli da "internacieco"...

Amplekso de L! : Ĉar la nombro da paĝoj kreskis de 306 en 1985 ĝis 348 en 1986, dum samtempe ne sufiĉe plialtiĝis la abonprezo, estas iometa defcito. Nenio danĝera, sed, ĉar la abonprezo estas nun fiksita je nur 30 FF, ni verŝajne ne povos superi ĉi-jare la rekordon pri paĝ-amplekso, kaj devos ankoraŭ pli zorge atenti la elspezojn.

Evoluo de L! : Dum 1986, nia bulteno, kiu iam konsistis nur el originalaj kontribuoj de legantoj, publikigis plurajn pli literaturecajn tekstojn, foje tradukitajn. Kompreneble, la libera sinesprimado de legantoj restas la ĉefa karakterizo de L! Ĉi-rilate, la debatoj aranĝitaj per ĉenleteroj suferas nun mankon je temenkondukoj. Ni vokas do por enveno de novaj interesatoj, kun freŝaj temsugestoj. Skribu al la red., kiu klarigos pri la funkciado de nia ĉenleteraro. Antaŭdankon ! Alia manko : desegnoj, aŭ almenaŭ "aerumaj" ilustraĵoj, sed tion ni jam de longe priploras, ĉu ne ?

La kaso :

Abonoj + donacoj :	10502,44	Eldonkostoj :	8931,55
		Afrankokostoj :	2510,75

Jara saldo : + 10502,44 - 11442,30 = - 939,86

Antaŭa saldo (85.12.31) : 7974,88. Restas nun en kaso (pĉk) : 7035,02 FF

BILANCO de SAT-Broŝurservo por 1986

Vendoj + Provizoj : 30879,90

Donacoj : 4222,78

Eldonkostoj : 16846,95

Afrankokostoj : 5311,00

Diversaĵoj (transĝiroj) : 3477,90

Aĉeto de "Aŭgusto" : 14825,00

Jara saldo : + 35102,68 - 40460,85 = - 5358,17

Antaŭa saldo (85.12.31) : 24244,50. Nun en la kaso : 18886,33 FF

Malfruantoj ! Kruco en tiu ĉi cirklo signifas, ke "Laŭte!" ankoraŭ ne ricevis vian reabonon !

La venontan numeron, fine de marto, ricevos nur la (re) abonantoj. Do... antaŭdankon al tiuj, kiuj akurate "ordigos" la aferon !

